

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

Redakcio kaj administracio : PARIS, 33, rue Lacépède.

ENHAVO

TH. CART : D-ro E. Javal. — C. WAGNER : Energio kaj Espero (trad. Sam. Meyer). — LEO BELMONT : Al proksimiĝanta ventego ; — Progreso (*poemoj*). — IVAN MALFELIĈULO : Paĝo el miaj rememoroj infanaj. — *Miksaĵoj* : Avara malavareco. En Zululando. Dudek unu barboj razitaj en dudek unu minutoj. Gustadiro. Kora memoro. La pleje skribata lingvo. Bagateloj. — TURGENEV : Haltu (trad. A. Vejtcler).

Tra la mondo Esperantista : Internacia Scienca Oficejo Esperantista. — R. DESHAYS : Pri la verboj kun *-igi*. — Movado Esperantista. — Bibliografio. — Gazetaro Esperantista. — Diversaĵoj.

Nia literatura Aldono (paĝoj 17-32) : FLORIAN : Du biletoj (trad. H. J. Bulthuis kaj L. Touchebeuf), *komenco*.

D^{RO} E. JAVAL

Ne nur al la francaj sed al ĉiuj Esperantistoj alportos grandan doloron la morto de nia kara blinda kunbatalanto D-ro E. Javal, ano de l'franca medicina Akademio. Tre gravan rolon li ludis — kvankam ne konitan de la plimulto — jus antaŭ kaj dum nia unua kongreso en Boulogne, kaj de tiu momento en nia tuta esperantista Pariza vivado. Ĉe li loĝis D-ro Zamenhof, kiam la unuan fojon li venis Parizon. Kia granda estis pri tiu ĉi vizito la ĝojo de

D-ro Javal tiuj scias, kiuj tiam vidis lin, kaj certe ne estas maldiskrete diri, ke lia amemo al nia komuna Majstro estis el la speco la plej fidela, pura kaj delikata. Sed tre modesta, kvankam konscia je sia propra valoro, li neniam fanfaronadis pri sia agado kaj pri sia rajta influo!

*

* *

Modelo estis al li, laŭ lia ofta diro, la fama Amerikano B. Franklin, kies moralajn kaj filantropiajn sentencojn li volonte citadis: « Ni agu bone, ne atentante pri kritikoj ».

Agi bone, esti al ĉiuj indulgema, neniam de ceteraj postuli ion, kio povus al ili kaŭzi, mi ne diras doloron, sed nur enuon, tia estis la regulo de lia vivo. Kaj se oni kelkafoje diskutis kun li, eĉ vive — ĉar li tute ne evitis kontraŭdiri — baldaŭ tamen la koro estis gajnita de lia boneco kaj oni lin forlasis kun pli granda estimo por li, pli kontenta pri la aliaj kaj pri si mem. Ĉu ne ĉe tiu ĉi signo oni konas la homojn eminentajn per la koro?

*

* *

Oni nur relegu lian lastan verketon *Inter Blinduloj*, kaj oni estos kortuŝita de la ĝentileco dissemita en la tuta libro, de la konstanta deziro de l'aŭtoro « malgrandigi la taskon de la personoj, kiuj, kun mirinda sindonemo, helpas al la blinduloj ».

Sed esti bona ne sufiĉis al D-ro Javal. Li opiniis, laŭ la bela parolo de l'germana poeto Göthe,

ke «senutila vivo estas frua morto», kaj ke ni ĉiuj devas klopodi por esti kiel eble plej utilaj al la aliaj. Sed tie ĉi decas lasi lin mem paroli.

«Ĉiu, — li skribas en la fino de sia libro — kia ajn estas lia situacio en la societo kaj lia inteligento, povas trovi kontentiĝon, laborante por la feliĉo de aliuloj... La sciencistoj — ĉe blindiĝo — havas privilegian situacion, dank'al siaj provizitaj utiligeblaj konoj. Dum ili ankoraŭ povas alporti ŝtonon eĉ plej malgrandan al la konstruado de la civilizacio kaj de l'progreso, ili sentas sin vivaj, kaj spite iaj vundoj, ili daŭrigas esti taŭgaj batalantoj, kiujn neegaleco de armiloj tiom pli fervorigas. Ankoraŭ pli feliĉaj ili estas, kiam ilia klopodado plie utiliĝas al iu, kaj ili povas serene ripeti la jenan parolon de l'Ekleziasto: *Mia koro gojis pri mia laboro, kaj nenion plu mi akiris el mia laboro!* » (El *Entre Aveugles* p. 161 kaj *Inter Blinduloj* p. 127-128).

Ion plu li tamen akiris kaj konservos: la dankan memoron de siaj amikoj, kiuj honoros lin pli bone ol per laŭdaj vortoj, per agado bona kaj utila.

TH. CART.

ENERGIO KAJ ESPERO

*Eltiraĵo el la libro « Vaillance » de C. WAGNER.**

I.

Ni akiru energion!

Por ĉiu vivanta estaĵo, la plej grava afero estas vivi.

Vivi tiel bone, tiel plene kiel eble, tio estas la unua instinkto, la ĉiama movilo, kiu sin kaŝas sub ĉiuj niaj unutagaj aspiroj. Tiu movilo puŝas la mondon. Ĝin obeas ĉio: la greno herbo elkreskanta el la sulko kaj unuafoje salutata de la suno, la kokideto ĵus elirinta el la ovo, la infano, kiu ĉiufanke malfermas al la vivo sian junan animon. Estas vero, ke kelkafoje ia homo diras, ke la vivo estas malbona, ke prefere estus, se ĝi ne ekzistus. Tio ne malhelpas la vivon estadi, tio ne haltigas la grandegan nevideblan puŝadon al la estado, tio ne sekigas la ĝermojn de la tero, nek la mirindan fruktodonecon de la oceano.

La vivo estas, jen la ĉefa fakto en la universo, kaj preskaŭ ĉiuj estaĵoj ne sole ĝin akceptas, sed ankaŭ aliĝas al ĝi kun entuziasmo aŭ mal-espero.

Sed vivi ne estas ĉio. Laŭ ia vidpunkto, tio eĉ estas tute negrava. La grava estas bone vivi. La demando, ĉu bone aŭ malbone vivi, ne ekzistas por

* Traduko farita kun permeso de la aŭtoro kaj de l'eldonisto. S-ro Fischbacher. Paris.

estajoj direktataj de senkonsciaj puŝoj kaj kiuj povus fari nenion alian ol tion, kion ili faras. Male, por la homo tiu demando estas la ĉefa. Formiko estas formiko nur tial, ke ĝi naskiĝis, ĝi plenumas sian rolon, sukcesigas sian laboron kaj okupas sian lokon. Ne sufiĉas naskiĝi por esti homo. Por la homo, naskigo estas nur la komenco de longa kaj malfacila perfektigo. Kaj tiu perfektigo parte dependas de li mem, de lia celo, de liaj penadoj. Sekve, por ĉiu el ni venas momento, en kiu ni devas demandi nin, al kio ni devas celi kaj kiamaniere ni devas uzi la vivon ricevitan. Alie ni riskas ĝin perdi aŭ ĝin fuŝe uzi. Kaj neniu povas esti indiferenta pri tia malfeliĉo. Entute ĉiu donas sian vivon kaj uzas siajn fortojn por tio, kio al li ŝajnas inda je ĝi. Li devas do deziri instruiĝi pri tiel grava demando: *Kio estas plej grava por homo?* Por bone vivi, kion oni plej bezonas? Por mi, mi sensanceliĝe respondas: *plej grave estas akiri forton*, kaj por vivi, homo, pli ol ĉion alian, bezonas *energion*.

Kvankam oni havas panon por manĝi, kaj plezurojn, kaj ĝojojn, kvankam oni posedas ĉiaspecan superecon laŭ riĉeco aŭ situacio: sen energio oni fariĝas la ludilo de la cirkonstancoj, la sklavo de la manĝata pano, de la amata virino, de la posedata bieno.

Kvankam oni havas inteligentecon kaj komprenemon, kvankam oni amasigis en si sciojn pri homoj kaj aferoj: sen energio la sciado restas senfrukta, kaj la plej bela ideo estas nur senĝerma grajno.

Kvankam oni havas konsciencan, kvankam oni zorge distingas la bonon de la malbono: sen

energio oni lasas la teron al la malbonuloj, la povon al la maljustuloj, kaj nia tuta konscienco utilas nur por vane ĝemigi nia pri malbonaĵoj, kiujn ni estas nekapablaj ataki kaj venki.

Male, estu malriĉa, senĝoja, senfavorigita de la naturo aŭ de la sorto: kun energio vi faros el tiuj malbonaĵoj bonaĵojn, el tiuj mizeroj rimedojn, el tiuj kontraŭuloj helpantojn.

Havu nur malgrandan klerecon, nemultajn sciotojn pri aferoj kaj homoj: kun energio vi utiligos tiun elementan sciadon; vi praktike uzos la nemulton, kiun vi konas: vi almetos tutan vivon da fideleco por la efektivigo de aferoj, kiujn la penso de la sciemuloj kaj de la delikatuloj ĉirkaŭtuŝas en unu mateno, por poste forlasi ilin kaj ektuŝi aliajn. Kaj dank'al kelkaj veraĵoj energie prezentataj vi faros al vi pasejon, kiel faris la macedona falango, malgrandnombra kaj ŝajne ne forta, kiu tamen venkis la grandegan armeon persan, brilan kaj malkuraĝan.

Havu konsciencan malluman sed senartifikan, mallertan por disertacii pri subtilaj aferoj, por prezenti la bonon en ĉiuj ĝiaj nuancoj kaj la malbonon en ĝiaj plej delikataj malbelaĵoj, sed havu konsciencan vivan, decideman; per unu vorto havu energion, havu la nevenkeblan fervoron de tiuj, kiuj volas, ke la bono estu kaj ke la malbono malaperu: tiam vi fariĝos remparoj por la justeco kaj disfalgaj frapilegoj kontraŭ la fortikaĵo de la malbono. Vi estos densa kaj timinda potenco, kiu flugas al sia celo kiel kuglego, ne salutante iun sur la vojo.

Kio fariĝos tio, se vi samtempe havas inteli-

genton, konsciencon, materiajn rimedojn, kaj se ĉio tio ĉi venas helpi vian energion?

Energio estas reĝo de l' mondo. Eĉ la boneco, la amo, la gracieco, ĉio ĉarma kaj admirinda valoras nur per la energio. Kio estas mola gracieco, senkuraĝa amo, malforta boneco? Brilantaj malvirtoj, nenio pli.

Energio estas la plej granda potenco.

Mi komparas kun ĝi tion, kion oni ĝenerale nomas *la Forto*, kiu, oni diras, superas la justecon, kaj min mirigas la absoluta supereco de la energio. Kion povus fari la sola forto? Ĉu kornoj de bovo povos haltigi la spiriton? Ĉu dentoj de leono povos frakasi la veron? Ĉu buŝego de paflegoj pli forte bruas ol la opinio kaj la voĉo de la justeco? Ne. Same, nenia materia forto povas ion kontraŭ la morala forto. Kie tiu ĉi komenciĝas, tie la alia finiĝas. Nur unu fortikajo estas nevenkebla: brava koro. Neniam oni povos esprimi la brilegan bonon radiantan en unu ago de vera interna libereco. Vidante ĝin, kiu ajn, se li estas homo, ektremas; ĉar li sentas, ke la nevidebla mondo tie preteriras.

La nokto estas malluma sur la oceano. Nenia stelo, kaj la kompasoj frenezigiĝis. La ventego blekegas, la maro ondegas. Tio estas la terura haoso, la monstra interfrapiĝo de la elementoj. Ifoje ekbrilas fulmo, kiu dum momento senvualigas tiun tutan majestecon sovaĝan. Kio estas pli granda?

Kio pli granda?

Mi tuj diros ĝin: Meze de tiu mallumo, balancata super tiuj profundegajoj, maltimiga piloto tenas la direktilon de ŝipo. Tiu ĉi homo estas pli granda ol la oceano kaj la ventego.

Jen estas mizera maljuna virino, preskaŭ kripla. Ŝia juneco pasis meze de riĉeco, eĉ de honoroj. Ŝi estis amata, dorlotata: ŝi posedis feliĉon en sia familio, ŝi ĝuis ĉian kontentigon de la koro. La vivo ridetis al ŝi. Sed jen la fatalo pasis super ŝi kaj senigis ŝin je ĉio. Hodiaŭ ŝi estas malriĉa kaj ankaŭ sola: pli ol tio, ŝi estas forlasita. Sed ŝia humoro ne maldolĉiĝis. Preskaŭ neniam ŝi parolas pri si. Kiam oni petas, ke ŝi rakontu siajn ĉagrenojn, ŝi deturnas la interparoladon por demandi pri la sorto de la aliaj. En ŝiaj okuloj malheligitaj de la ago, sur tiu sulkigita frunto, en la premo de tiu malgrasiginta maneto, estas tiom da pura boneco, ke la plej malfeliĉa homo ricevas de ĝi sanigan rekuragigon. Mi ne ĝuste scias, kion mi sentas, nek kial, nek el kiu fonto tiu vivo ricevas forton, sed ion mi klarege sentas: tie, en tiu ruinigita korpo, inter tiuj kvar nudaj muroj loĝas potenco antaŭ kiu paliĝas ĉio, kion oni ĝenerale nomas granda kaj forta en tiu ĉi mondo.

Tie ĉi la kurago sin montras al ni en ankoraŭ pli alta grado ol ĉe la maristo, pri kiu mi ĵus parolis, kaj tio ĝuste, ĉar, se oni konsideras nur la eksterajon, tiu viro estas pli forta ol tiu ĉi virino. Estas anima braveco, kiu sin montras eĉ en la foresto de ĉiuj materiaj rimedoj.

Sed, en kiu ajn grado kaj kiaj ajn kondiĉoj, ago de morala forto ĉiam prezentas al ni ion, kun kio nenio alia estas komparinda.

Dank'al Dio la sento de morala grandeco ne mortis ankoraŭ ĉe ni. Inter tiom da falintaj reĝecoj tiu ĉi almenaŭ restas staranta en la universala estimo. Ho ve! Kial nia admiro por ĝi devas esti kunmiksita kun maldolĉaj bedaŭroj? Ni rigar-

das al ĝi, kiel malsanuloj al saneco, kiel ekzilitoj al la patrujo. Kaŝita doloro, premanta nostalgio sin enmiksas en nian respekton.

Kio plej mankas en nia tempo estas la profunda kaj certa kvieto, kiun liveras la anima forteco. Priveligitaj laŭ tiom da vidpunktoj, ni estas mizeraj kaj malriĉaj laŭ la karaktero. Nia morala fibro ŝajnas esti malstreĉita. Kaj pro tio en iaj horoj tiu civilizita societo aperas al ni kiel bela ŝipo, kiun la sciencoj, la artoj, la industrio provizis per la plej mirindaj maŝinoj kaj la plej belaj arangoj, sed al kiu, meze de la maro, subite mankas karbo; kaj jen la belega ŝipo estas nun perditajo naganta laŭ la volo de ventoj kaj ondoj.

Ni bezonas do antaŭ ĉio proviziĝi je moviga forto.

II.

La valoro de la vivo.

La moralan energion oni ne desiras mallaboreme, kiel floron sur arbetaĵo: oni devas akiri ĝin labore, kaj kelkafoje oni eltiras ĝin, kiel la karbon, el mallumaj profundaĵoj. Mi tuj konigos kelkajn, el kie oni ĝin ĉerpas.

Unu el tiuj fontoj estas la alta ideo, kiun oni faras al si pri la vivo. Ni ĉiuj fariĝas indiferentaj pri la vivo, ĉar ni tiel ofte renkontas ĝin sur nia vojo. Ĝi jam ne mirigas nin. Tiel, kelkaj montanoj, ĉiam havante antaŭ la okuloj la belegajojn de sia naskiĝa valetto, fariĝas nesentemaj pri ili. Ili do bezonas forlasi la landon kaj tien reveni, kiel fremduloj, por esti tuŝataj de ĝia pentrinda kaj impona vidiĝo.

Necese estas same, ke ni eltrovu, kiel novajon, tion, kion ni kredas koni jam de longe. Tio ne estas facila afero. Kvankam la plimulto el la homoj rigardas ne vidante, al ili ne plaĉas, ke oni montru al ili, kion ili ne vidas. Tio, kio ĉirkaŭas ilin kaj estas tre proksime de ili, lasas ilin indiferentaj. Kaj tiu malŝato de la proksimaĵoj estas nur rebrilo de la malalta ideo, kiun ili havas pri sia propra vivo. Sendube ĉiu havas sian fierecon, malsagan malhumilecon, pro kiu li preferas sin ol la aliajn. Sed tiu ĉi malhumileco sin apogas sur tion, kio en ni estas malplej bona, kaj nutras sin per ĝi. La sento de la vera indeco estas treege malofta.

Kiel ajn malhumilaj ni ĉiuj estas pri nia supraĵa persono, al ni mankas la fiereco, kiun naskas la respekto al sia intima estaĵo. Tamen tiu ĉi sento estas fonto de potenco. La homo, kiu komprenas sian propran valoron, estas en multe pli bona situacio, ol tiu, kiu sin malŝatas.

Kiu redonos al ni tiun freŝecon de sentoj, dank' al kiu oni rigardas ĉiujn aferojn, kvazaŭ oni ilin vidus unuafoje? Tiu sentigus al ni antaŭ la plej humila floro ion, kion mi nomus brilega vidigo de la vivo.

Kaj tion oni bezonas esti koninta. Oni bezonas esti metita, kvankam nur unufoje kaj dum unu momento, sur la sojlon de la senfinaĵo, kaj esti ricevinta, kiel en vizio, la rivelon de tio, kio estas plej grandvalora, multekosta, nemezurebla en ĉiu animo, en ĉiu homa vivo, kaj havi por ĝi amon kaj kulton.

Kiam junulo, alveninte al ia horo, kiun li jam ne forgesos, ricevas rivelon pri la patrujo, pri ĝia historio, pri ĝiaj doloroj kaj pri ĝiaj belaĵoj,

en li okazas io sankta. Li naskiĝas por nova vivo. La ideo pri Patrujo pasis sur lia animo kaj per unu fojo ĝin nobligis. De tiu momento li estas kapabla je grandaj faroj kaj je grandaj suferoj por tiu lando, kies filo li estas. Trempita, kiel la ŝtalo, en banaĵon, kiu dekobligas liajn fortojn kaj igas lin respekti sin mem, kiel oni respektas standardon, li fariĝis pli ol individuo, li estas parto de tuto.

Ĉe la homo, kiu ricevas la rivelon pri la homa indeco, io simila okazas. Li retremas sin en sian fonton, li revenas al sia origino, li mezuras kaj provas, kiom da sanktaj penadoj, paciencaj suferoj, humilaj esperoj, nekalkulebla laboro estas amasigitaj en tiu homa vivo, kies heredanto li fariĝis. La animo de centjaroj penetris lian animon. La granda espero, kiu vivigas kaj subtenas tiun doloran disvolviĝadon de la homaro tra la senmezuraj tempoj, blovis sur lin. Li renkontis sur sia vojo la Volon, kiu ordonis, ke estu la mondo kaj ke estu homoj, kaj li aliĝis al tiu ĉi Volo. Li komprenas (kaj tio estas la esenco mem de la kredo), ke ĉiu homo estas unu espero de la homaro, unu espero de Dio. De nun li jam ne estos limigita laŭ siaj propraj rimedoj, li havos kun si la tutan puŝadon de la centjaroj kaj la helpon de la Eterneco.

Ho! kiel kulpaj estas tiuj, kiuj malsatigas la homecon, mallaŭdas la homon, kaj plezure trempas ĝin en koton! Kiel blindigitaj de sia malsaĝa malhumileco estas tiuj, kiuj parolas, kvazaŭ ili estus kalkulintaj la stelojn kaj la marajn sablerojn, eltrovintaj la misteron de la vivo, tuŝintaj la fundon de ĉiuj aferoj, por tie trovi nur la neniaĵon! Ili insultas la esperon sur la frunto de la junuloj, estingas la flamon en ilia rigardo kaj en ilia koro,

konsumas ilian forton, difektas ilian purecon, instruas ilin malsati la vivon. Ili faras la plej grandan krimon: malamigi al la homo lian destinon, kvankam nur la intima sento de tiu destino povas lin subteni, kuragigi, konsoli, meze de tiom da neklarigitaj kruelaĵoj, mallumaĵoj kaj tentoĵoj.

Tiu, kiu estas konvinkita pri la indeco de la vivo, kunportas tiun senton en la tuta detalaro de siaj agoj kaj spertoj. Nenia detalo povas ŝajni al li indiferenta au negrava: li kunigas ĝin al la tuto. Kiam oni scias, ke la ŝajne plej sensignifa ago kunlaboras por efektiviĝi aŭ malhelpi grandan faron, tio influas sur la tutan konduton. Kaj tio estas persista rekuraĝigo en ĉiuj malfacilaĵoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, kiam oni scias, ke la plej humila forto estas envolvita en la tuta ago, ke nenio kaj neniu forgesigas aŭ perdiĝas, kaj ĉiam estas mil kauzoj por rekuraĝigi kaj ke tiuj malplej eraras, kiuj plej esperas.

Tie ĉi mi citas kelkajn liniojn ne skribitajn de kredanto, kiuj ĝuste pro tio pli valoras kiel atesto:

« La malbono fizika kaj morala, la mizeroj de l'animo kaj de la sentoj, la sukceso de la malbonuloj, la humiligo de la justuloj, ĉio tio ĉi estus tamen tolerebla, se nur oni komprenus la ordon kaj ekonomion de ĝi, kaj se oni en ĝi divenus Providencon. La kredanto ĝojas pri siaj vundoj; al li plaĉas la maljustaĵoj kaj perfortoĵoj de liaj malamikoj: eĉ liaj kulpoj kaj krimoj ne forprenas de li la esperon. Sed en mondo, kie estingigis ĉiu lumigo de kredo, la malbono kaj la sufero perdas eĉ sian signifon kaj ŝajnas nur abomenaj ŝercoj kaj malgajegaj farsoj.

« Ne estas alia ŝlosilo de la mondo, krom la kredo. Tro vera estas tio » (1).

Se nun iu petas, ke mi resumu la tujan celon de la homa vivo, mi respondos:

La celo de ĉiu afero estas montrata de la afero mem. Tiu celo estas: fariĝi ĉio, kio ĝi povas esti, kunlaborante per sia tuta amkapablo kun la eterna Volo, kiu penas plenumiĝi per ĝia pero.

La homo estas difinita por fariĝi pli kaj pli homo, por subtenadi sian vivon, kaj kio estas sama por helpi la aliajn subtenadi la sian en ĝia normala kreskado. Nu, la normala kreskado postulas la disvolvigon de la tuta estaĵo, fizika, inteligenta, morala, en harmonia reciprokeco. La homo do estas difinita por realigi sur la tero la veran kaj justan vivon, kaj por batali kontraŭ ĉio, kio malhelpas ĝin. La homaj aferoj havas sian plej altan punkton en la justeco, kiu estas ilia superega celo. Oni povas diri, ke *la celo de la homo estas fariĝi potenco por la Justeco*. Kredi al la vivo estas kredi, ke ĝi estas batalo, en kiu la justeco venkos. Ni devas do plifortigi, batali, suferi se necese, sed neniam perdi la esperon.

Kaj poste? *Poste*, kiel *Antaŭe* apartenas al la Volo, kiu kreis la vivon kaj la homon. Ĝi sola konas la malproksiman misteron de la mondo. Kaj ĝi verŝajne volis, ke tio, kio estas apud ni, ŝajnu al ni pli grava ol tio, kio staras malproksime: ĉar en ĝi nia respondeco estas enmetita. La vojo de l'homo estas tia, ke li klare distingas la parton de ĝi, kiun li havas sub la piedoj, kaj ke li samtempe devige ekvidas antaŭ li la komencigan linion al la

(1) Anatole France.

transaĵo. En tiun ĉi transaĵon oni neniam devas enprofundiĝi, ĉar oni tiel forgesus vivi; sed ĝin oni ne devas forgesi, ĉar oni ne scius plu, kial oni vivas. La homo bezonas « senti, dum li penas, ke la mortema laboro havas senliman daŭrigon; ke ĝi restas, kaj ke la eterneco donas manon al la horo. » (1)

Konkludo: *Faru* tion, kion vi devas, kion postulas via supera intereso kaj tiu de la aliaj, kaj estu trankvila, konfidu al Tiu, kiu scias, kial la mondoj ruliĝas!

La fundamenta dogmo estas: kredi al la vivo; la ĉefa herezo: ne havi esperon.

Trad. SAM. MEYER.

AL PROKSIMIĜANTA VENTEGO

De poeto ĉeĥa **Jaroslav Urechlicky.**

Tra vojo senfina venegu, kuregu,

— *Purigu la mondon!*

La tondr' estas hufo al via piedo

— *Purigu la mondon!*

Tremigu la teron dormete kusantan

En timo je morto kaj inter putraĵoj

— *Purigu la mondon!*

Per ventaj sovaĝaj flugiloj rapidu,

Al blov' kondukilojn aerajn eklasu,

— *Purigu la mondon!*

(1) « De sentir en peinant que le travail mortel
« A son prolongement infini; qu'il demeure,
« Et que l'éternité donne la main à l'heure ».

*Kaj cion malnoblan, malaltan batadu
 Kaj pro nevengito ekvengu kruele
 — Purigu la mondon!
 Ho batu!... En koro en mia ekbrulu,
 Por ke renaskigu mi, kiel fenikso...
 Purigu la mondon!*

Esperantigis LEO BELMONT.

PROGRESO

De poeto pola **Asnyk**.

*Laboroj vanaj vana plend'!
 Senforta malbenado!
 La formojn mortajn ia sorc'
 Ne turnos al estado!
 Per temp' preniton — al la temp'
 Ne povas mond' depreni.
 Ne povos fajr', ne povos glav'
 Kurantan penson teni.
 Kun vivaj ĉiam iru vi!
 La novan vivon amu!
 Obstine per velkinta laŭr'
 La kapojn ne ornamu!
 Ne repusebla viva ond'
 Sencele vi sopiros!
 Koler' senforta! vana plend'!
 Antaŭen mondo iros!...*

Esperantigis LEO BELMONT.

PAGŔO EL MIAJ REMEMOROJ INFANAJ

De **Ivan Malfeliĉulo**

... Fiser estis mia unua kaj ankau lasta amiko. Sorto kunligis nin nedissireble ankoraŭ en dua klaso de urba lernejo, kien mi estis metita naŭjara.

Pro mia karaktero kaŝema mi estis neamata de miaj kolegoj; ili mokis min kaj evitadis mian partoprenon en la ĝojaj ludoj, petoloj kaj kuraĝaj malbonintencoj kontraŭ nia «observanto» simplanima — la maljunulo diketa Sotin, kiun ni ordinare nomadis «Kapro». Tiu ĉi moknomo, donita al Sotin pro lia tre longa, mallarĝa kaj maldenshara barbo estis tre konvena al la maljunulo. Memafere, se ia flanka homo ekrigardus je unua fojo lian longforman vizaĝon kun okuloj kovritaj per densaj brovoj kaj lian barbon priskribitan pli supre, en lia kapo tuj naskiĝus penso pri simileco lia kun ia besto, kaj la lango nepre, eĉ kontraŭvole, tuj dirus: «Rigardu, jen estas maljuneta kapro!» aŭ «Kiel vi fartas, kapreto?» ... Tiujn ĉi vortojn dirus nevole la lango de ĉiu bonanima homo, sed malmolestulo aldonus: «Kial vi mallevas malgaje vian kapran barbon?»

Tiu ĉi bona maljunulo estis objekto de petoloj de miaj kolegoj. Eĉ unu tago ne pasis, dum kiu ili ne elpensis novan malbonan ŝercon kontraŭ li; jen, okaze forgesita, lia tabakujo estis plenigata anstataŭ flartabako, per pulvorpipro — kaj nia Kapro flaris ĝin kun teruraj konvulsioj: jen liaj

galoŝoj estis alnajlitaj al la planko — kaj la mal-feliĉulo neatendite falis teren, ne povante movi la piedojn. Tiuj ĉi ŝercoj estis fonto de ĝojo de ĉiuj lernantoj. Kiu prosperis elpensi novan pli lertan ŝercaĵon kontraŭ Sotin, tiun honoris ĉiuj kolegoj same, kiel oni honoradis heroojn en tempoj antikvaj. Kompreneble ĉiuj penis elpensi ion por mal-lumigi la gloron de siaj antaŭuloj — efektivigi sian elpensitan ŝercon kaj meriti enviindan honoron, des pli ke nia Kapro estis tre pacienca, pardonema kaj bonkora. Li havis kutimon, trovinte kulpulon, diri duone inspireme, duone ŝercante: « Kanajlo, vi ree ofendas min sendefendulon . . . Mi plendos al la inspektoro . . . »

Sed ni ordinare nur ridis liajn vortojn similajn, sciante, ke li neniam plendos . . . tiamaniere la malbono ne estis elradikigita.

Mi jam diris, ke mi estis forigita eĉ de partopreno en tiuj ĉi ŝercoj. Kiam, ekzemple, oni ridis la faligantan maljunulon pro galoŝoj najlitaj, — mi estis devigata forpeladi eĉ rideton de miaj lipoj por ne elvoki mokojn aŭ batojn de la kolegoj. Tiu ĉi malamo kauzadis al mi multe da korturmentoj. Sidante ie for de la ĝoja kolegaro mi penis elpensi ion neordinaran por mirigi la kolegojn kaj altiri sur mian flankon atenton, amon kaj estimon iliajn.

Unufoje, aŭtune, mi sidis kiel kutime sola apud fenestro kaj manĝis kun ĝuo duonon de akvome-lono. Mi lerte eltranĉadis el ĝia internaĵo maldikajn pecetojn, metante ilin unu post alia en la buŝon, ne tuŝante ĝian dikan verdan ŝelon. Kiam la tuta molaĵo estis formanĝita kaj restis solaj flankoj de la frukto — duonglobo malplena — en mia kapo naskiĝis penso feliĉa, kies efektivigon mi ne

volis prokrasti. Ekkurinte rapide en la lavĉambbron, mi plenigis mian vazon akvomelonan per akvo, revenis en la klasoĉambbron kaj starigis ĝin sur fenestro malfermita. Nia klaso estis sur la dua etaĝo: ĝiaj fenestroj rigardis korton kaj preter ili kuŝis vojeto — amata loko de posttagmanĝa promenado de Kapro. Mi malpacience rigardis tiun ĉi vojeton, atendente la aperon de Kapro. La kolegoj ankaŭ sidis apud fenestroj najbaraj — ili rigardis min nun pli malamike kaj murmuretadis ion. Subite unu el ili ekkriis :

« Kolegoj, rigardu, Kapro videble perdis sian ĉapon, — li iras kun kapo nuda! Rigardu, kia senharaĵo!... »

Efektive ies figuro kurbiĝinta kun nuda senhara kapo paŝetis laŭ la vojeto preter la fenestroj. Mi ekstremis, la koro ekbatis iel malsaneme, nebulo kovris miajn okulojn kaj mi, laŭte dirinte : « Aŭ nun, aŭ neniam! » renversis la akvomelonvazon sur la kapon de l'preteriranto...

Laŭta krio ekŝanceligis la silentan aleon : « Kapro akiris novan ĉapon!... » Mi vidis nenion, sed konjektis, ke la ĉapo — duono de akvomelono — enfalis ĝuste sur la kapon de Kapro. Sed post unu momento la ĵus aŭdita laŭta ekkrio estis anstataŭigita per terura murmureto: « La inspektoro!... La inspektoro, sed ne Kapro!... »

Efektive estis farita nepardonebla eraro : mi ja sciis bonege, ke en nia lernejo estas sola senharulo — severulo inspektoro...

Tiu ĉi tago memorinda estis tago de turmentoj animaj kaj komenco de mia triumfo. Mia ŝerco malbona estis punita tro severe, sed tiu ĉi puno estis faciligita per komuna simpatio de la kolegoj.

Oni kondamnis min je dusemajna aresto en la malluma lerneja malliberejo, difinis al mi dum la templimo de la aresto nur solan panon kaj glason de panacidaĵo ĉiutage, — sed tio ĉi ŝajnis ankoraŭ nesufiĉa, — la ofendita inspektoro malpermesis al mi foriĝon hejmen dum la Paskaj festoj. Kiel vidas la legantoj, la puno estis tre malfacila, senkompata: malgraŭ tio mi nek mortis, nek malsaniĝis en la malliberejo. Kontraŭe, kiam, en la deka tago de mia mallibero, venis al mi nia doktoro lerneja, mi estis sufiĉe freŝvizaĝa, sana kaj eĉ iom pli dika.

« Sed kiel vi ne mortis pro malsato? » — demandis kun rideto la doktoro.

Mi respondis sincere al la bona doktoro, kiun estimegis ĉiuj lernantoj pro liaj afablaĵoj kaj dorlotajoj: « Sinjoro doktoro! Profeto Heli dum longa tempo loĝis en dezerto senfrukta, tamen li ne mortis pro malsato dank'al korvoj, — ankau tie ĉi korvoj liveras al mi nutraĵon...

Mi formetis la kusenon sur la lito kaj montris al la doktoro amason da manĝaĵo bongusta kaŝitan sub ĝi.

La doktoro ree ekridis kaj, ĉirkaŭrigardinte la ĉambron de mia mallibero, demandis: « Sed kie viaj korvoj prosperas enflugi al vi? Mi ne vidas eĉ truon malgrandan, tra kiu oni povus meti nutraĵon al vi. La pordoj ja estas ĉiam ŝlositaj? »

« Jes! Sed miaj birdoj liveras la panon jen tie ĉi!... » mi respondis, montrante sufiĉe vastan fendaĵon sub la pordoj.

« Bonege!... Hm!... Bonege! Mi ankoraŭ ne sciis ĉi tion », — parolis la mirigita doktoro. Nun mi sendados ĉi tien malsanulojn: mi esperas, ke tiu ĉi malliberejo bone influos ilin ».

Mi jam diris, ke rekompenco por mia heroaĵo estis simpatio de la kolegoj — kuraĝaj arogantuloj, kies ĉefo estis Fiŝer. Dank'al sia sperteco en aferoj similaj, li tuj konjektis, ke mi estas ne timulo malestiminda, aŭ spiono, sed heroo, — inda partiano de lia bando.

Post mia liberigo, mi ricevis partoprenon ne sole en ĉiuj entreprenoj de la kolegoj, sed ankoraŭ en ĉiuj iliaj sekretoj, kiuj pli frue estis peneme kaŝataj por mi. Ĉar Fiŝer favoris al mi, do nun neniu povis senpune ofendi aŭ moki min: — akirinte amikon tiom potencan, mi ekspiris pli libere.

I. MALFELIĈULO.

MIKSAĴOJ

Avara malavareco.

Timo kaj espero estas du pasioj tre kontraŭaj, unu al alia, kaj pro tio kreantaj efikojn diferencajn.

Tamen, mi ne scias, ĉu oni ne povus diri, ke ili kuniĝis en persono de franca reĝo, kaj tie produktis saman efikon: timo al morto; aliparte espero pri longa vivo.

Sciiginte, ke en lia kortego estas homo antaŭdiranta estontaĵojn, tiu ĉi princo, kiu kredis lin trompulo, decidis mortigi lin per eljeto tra fenestro, laŭ respondo, kiun li donos al la demando: li, kiu pretendas koni la estontecon de aliaj, ĉu li scias tion, kio tuj okazos al li mem? La reĝo do venigis lin.

La astrologiisto, eble antaŭpensante la intencon de l'reĝo, respondis: « Tre bone: mi mortos du horojn antaŭ via Reĝa Moŝto. »

Timigite pro tiu respondo, li ŝanĝis sian decidon, donigis al li pension, kaj ordonis zorgi lian personon.

E. R.

En Zululando.

Se ni kredus la rakonton de iaj esploristoj, la Zuluoj, eĉ nun, kiam la civilizeco eŭropa jam komencas transformi iliajn morojn, havas tre apartan manieron por ornami tombojn.

Ili tute ne konas kronojn el perloj, palmojn el zinko eĉ florojn naturajn. Se avizletero estus kutima en ilia lando, certe ili ne forgesus surskribi la frazon de nun akceptitan ĉe ni: « Nek florojn, nek kronojn. »

Sed interŝanĝe, ili sur katafalkojn nedelikate konstruitajn, kaj poste sur tombojn, videblege demetas la lastan recepton de la kuracisto, kiu kuracadis la mortinton — se oni flegis lin —, kaj ĉiujn malplenajn boteletojn de kuraciloj ensorbitaj dum la lastaj tagoj de malsano.

Oni povus multe veti, ke la eŭropaj kuracistoj ne konsentus akcepti ĉe ni tiun ĉi publikigan modon iom funebran sed tre malican...

La Zuluoj ne estas malspritaj.

E. R.

Dudek unu barboj razitaj en dudek unu minutoj.

Miss Nell Wick, kiu malgraŭ sia juna aĝo estis la plej fama razistino en Anglujo, ĵus mortis. Ŝi estis filino de l'fama raz-profesoro Deddy Wick alnomita razisto-fulmo, kiu komencis uzi razilon eĉ antaŭ ol manĝi sen helpo supon. ĉar, estante 4-jara, li povis montriĝi sur scenejo kaj tie efektiviĝi tiun ĉi mirindajon: razi 12 virojn en 15 minutoj.

Havante la aĝon de ok jaroj la juna Miss partoprenis en konkurso, en kiu partoprenis ankaŭ 25 aliaj virinoj, kaj sukcesis razi 21 virojn en 21 minutoj. Ŝi tiam ricevis la titolon razistino-rekordulino por la tuta mondo, antaŭulino de la veturigistinoj, kiuj nun ekaperas en Parizo.

P. C.

Ĝustadiro.

Napola ĥirurgiisto estis rigardata kiel vera kontraŭulo al melankolio. Neniam oni sin amuzis pli bone ol tie, kie li estis.

La vicreĝo aŭdinte pri tiu persono, volis sciigi mem, ĉu la diroj estas veraj. Por tio, li venigis lin, pretekstante ian servon, sed efektive por ke li parolu.

La ĥirurgiisto, neniel dirante ŝercaĵojn, konservis antaŭ la reĝo ĉiam respektan silenton, kiun li kredis deva antaŭ homoj tiarangaj.

Tio ĉagrenis la vicreĝon, kiu **ekkredis** ke oni mokis lin, kaj ke la ĥirurgiisto estas nur malspiritulo ; tial, forpermesante lin, li donis al li la plej malgrandan kupran moneron tiaman.

La ŝerculo dankis plej ĝentile, kaj rigardinte ĝin, li demandis Lian Moŝton, kiom li devas redoni.

Tiu ĉi demando tiel kontentigis la princon, ke li pagis tre malavare.

E. R.

Kora memoro.

Antaŭ kelkaj jaroj mortis en Genevo maljuna fraŭlo riĉega, kiu per testamento lasis al ia maljuna vidvino renton da ses mil frankoj.

Tiun ĉi vidvinon li estis aminduminta, dum ŝi estis juna knabino.

Antaŭ ol morti, li skribis al sia eksamatino la jenan strangan leteron :

« Sinjorino, antaŭ kvindek jaroj mi alvenis en urbon, kie vi tiam loĝis, petonta vin edziniĝi je mi.

Vi rifuzis, kaj tiu via decido liveris al mi duonjarcenton da paco kaj trankvileco ; mi do ŝuldas al vi kompensaĵon. »

La pleje skribata lingvo.

La lasta poŝta kongreso, kiu okazis en Washington, donis al la Angloj la gloron posedi novan rekordon : la oficialaj esploraj ciferoj konigas, ke du trionoj el la leteroj dissenditaj en ĉiuj diversaj poŝtaj oficejoj de l'terglobo, estas skribitaj en angla lingvo.

Tamen el la kvincent milionoj da homoj, kiuj parolas unu el la dek aŭ dekdu modernaj lingvoj, estas nur 125 milionoj parolantaj en angla lingvo.

Do, la angla lingvo estas multe pli skribata ol parolata.

Jen estas la bilanco de la ceteraj lingvoj parolataj, krom la angla, de tiuj ĉi 125 milionoj da homoj : rusa, 90 milionoj ; germana, 75 milionoj ; franca, 55 milionoj ; hispana, 45 milionoj ; itala, 35 milionoj ; portugala, 12 milionoj ; hungara, 10 milionoj.

L. C—s.

DIAGNOZO. — Hundeto ĵus mordis la suron de ia promenantanto.

Tiu ĉi mordito, sin turnas al la mastro de l'hundo kaj diras :

— Sinjoro, via hundo mordis min, donu al mi vian nomon kaj vian adreson, mi petas.

— Tre volonte ! Sed vi ankaŭ donacu al mi vian vizitkarton.

— He, kial ?

— Por ke mi povu viziti vin. — Jam de iom da tempo mia hundo estas stranga en sia konduto. Mi deziras scii, ĉu ĝi havas rabion, kaj ĉu mi devas buĉiĝi ĝin. Tute ĝustatempe, ni renkontiĝis tie ĉi, kaj tiel vi povos liveri al mi tre utilajn monstrojn.

E. N.

CE KURACISTO. — Rigardu, sinjoro doktoro, miajn okulojn ; ŝajnas al mi, ke brulumo kaptis ilin, mi eĉ timas, ke mia vido difektiĝos.

— Kia estas via profesio ?

— Mi estas ĉambristino ĉe gesinjoroj X.

— Ha, mi jam komprenas ! Jen mia konsilo sekve de mia konkludo : ne subrigardu plu tra la ŝlosiltruo de l'pordo de la gastoĉambro.

MOKO. — Ĉu vi bone sukcesis en via scienca parolado ?

— Jes, la aŭdantoj aŭskultis mian tutan paroladon kun malfermita buŝo.

— Ha ! ili do ocedis.

KOMPREENBLA RESPONDO. — *La razisto* : Ĉu mia razilo estas bona ?

La razato : Ĉu ĝi estas razilo ? Mi pensis ke raspilo.

VERDIRO. — Nu, kion diris al vi la orakolistino ?

— Ke iu forlogos de mi la monon.

— Kaj forlogis iu ?

— Jes, la orakolistino.

KIA RAPIDECO ! — Intervilaĝa vagonaro haltas en loko senstacia. Post reekveturo, unu vojaĝanto demandas la konduktoron pri la kaŭzo de l'halto.

— Unu bovino staris inter la reloj, ni do devis ĝin forpeli.

Post kvaronhoro la vagonaro denove haltas.

— Kial do ni devas halti denove ? — demandas la sama vojaĝanto.

— Car denove inter la reloj staras *tiu* bovino.

— *pd.*

EN RESTORACIO. — Sinjoro, ĝentila en manieroj kaj paroloj, sidante ĉe tablo, rigardadas sian teleron per okulo melankolia.

Kelnero paŝas ; li vokas :

— Amiko, diras li ne rapide, mi ne povas manĝi tiun ĉi supon...

La kelnero, ne lasante lin fini, alsaltas kaj ŝanĝas la teleron.

Denove, la kliento revokas :

— Amiko, mi ne povas manĝi ankaŭ tiun ĉi supon....

— Sed, kial ? pro kio ? — balbutas la malfeliĉa kelnero.

— Mi ne povas manĝi vian supon.... ĉar mi ne havas kuleron !....

E. R.

HALTU !

El *Pocmoj en prozo* de IVAN TURGENEV.

Haltu ! kian mi nun vidas vin — tia restu por ĉiam en mia memoro !

De la lipoj deŝiriĝis la lasta inspirita sono, la okuloj ne brilas nek flamas, — ili mallumiĝas, ŝarĝite de feliĉo, de feliĉega konscio de tiu beleco, en kies postsignon vi kvazaŭ eletendas viajn triumfantajn, viajn lacigintajn brakojn.

Kia lumo, — pli delikata kaj pli pura, ol la suna lumo, — disverŝiĝis en ĉiuj viaj membroj, sur ĉiuj plej malgrandaj faldejoj de via vestaĵo.

Kia dio per sia afabla spiro deĵetis posten viajn disŝutitajn buklojn ?

Lia kiso flamas sur via frunto paliĝinta kiel marmoro.

Jen estas ĝi — la eltrovita mistero, la mistero de l'poezio, de l'vivo, de l'amo ! Jen estas ĝi, jen estas ĝi, la senmorteeco ! Alian senmortecon oni ne havas, — kaj oni ne bezonas ĝin. Je tiu ĉi momento vi estas senmortema.

Ĝi pasos, — kaj vi denove fariĝos prenetajo da cindro, virino, infano.... Sed kion ĝi signifas por vi ! Dum tiu ĉi momento vi fariĝis pli supra, vi fariĝis ekster ĉio pasanta, tempa. Ĉi tiu via momento finiĝos neniam.

Haltu ! kaj ebligu al mi esti partoprenanto de via senmorteeco, lasu fali en mian animon la rebrilon de via eterneco !

Tradukis A. VEJTLER.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Internacia Sciencita Oficejo Esperantista.

Jus fondiĝis en Genevo Internacia Sciencita Oficejo, kies direktoro estas S-ro René de Saussure oficiale delegita de la komitato de la fondiĝanta *Internacia Sciencita Asocio Esperantista*. Niaj legantoj scias, ke la fondo de la nomita Asocio estas decidita en Genevo de diversaj sciencistoj kaj sciencamantoj, membroj de la II-a Kongreso Esperantista, kiuj tie subskribis deklaron esprimantan la deziron, ke: 1-e, la sciencistoj uzu konstante la lingvon Esperanto en siaj internaciaj Kongresoj; 2-e, la sciencaj gazetoj gravaj kaj internacie disvastigitaj akceptu artikolojn redaktitajn en Esperanto kaj plie aldonu al ĉiu artikolo redaktita en nacia lingvo Esperantan resumon de ĝia enhavo.

La unua celo de la ĵus fondita Oficejo estas helpi al la organizado de la Sciencita Asocio kaj kolekti novajn aliĝojn al la Deklaracio subskribita de la kunvenintoj en Genevo. La subskribintoj de la dirita deklaro estos sendube la unuaj, kiuj deziros aliĝi al la Asocio.

Ĝia dua celo estas kunhelpi al la redaktado de la esperantistaj sciencaj revuoj kaj al la jam komencita verkado de la teknikaj vortaroj de la lingvo Esperanto. Por tiu ĉi celo la sciencistoj kaj sciencamantoj adeptoj kaj aprobantoj de Esperanto en ĉiuj landoj estas petataj sendi al la Oficejo sian nomon por la kreo de Internacia Komitato, kiu laboros por akceli la komencitan entreprenon kaj kies fundamenta organizo estos proponata al la fonda ĝenerala kunveno de la Esperantista Sciencita Asocio dum la III-a Kongreso en Cambridge.

La oficiala organo de la Oficejo estas *Internacia Sciencita Revuo*, kiu de nun aperos ĉiumonate en Genevo, kaj regule informos pri la agado de la Asocio. S-ro René de Saussure petas nin atentigi la legantojn de L. I. pri la sekvantaj punktoj:

1° La aliĝo al la Internacia Sciencita Asocio estas senpaga kaj postulas nenian monan kotizaĵon; la Geneva Sciencita Ofi-

cejo danke ricevas monoferojn (ne malpli ol 2 fr.) kaj abonojn al *Scienca Revuo*, sed tiuj ĉi donacoj kaj abonoj estas nur *laŭvolaj*.

2^o La Scienca Asocio konsistas ne nur el sciencistoj, filozofoj, kuracistoj, sed ankaŭ el inĝenieroj, arkitekturistoj, oficiroj, juristoj kaj ĝenerale el la reprezentantoj de ĉiuj industrioj.

Ni ne bezonas rimarkigi niajn legantojn, kiel grava estas tiu ĉi entrepreno por la sukceso de Esperanto; ni varme admonas ĉiujn el ili, kiuj estas sciencistoj aŭ sciencamantoj, ke ili tuj skribu al S-ro René de Saussure, por ricevi klarigajn cirkulerojn pri la Asocio kaj ĝia Oficejo. (Adreso: Internacia Scienca Oficejo, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Suisse.)

Pri la verboj kun -igi.

Atendante ĝis la Lingva Komitato, okupata de alia urĝa kaj bona laboro, povos trakti tiun ĉi temon, mi kredas utile prezenti kelkajn rimarkojn simplegajn pri postuloj de logiko ĉe tiu demando.

Unue, kun verboj ne povantaj ricevi rektan komplementon, nenia dubo ekzistas: *Igi* rilatas la aganton.

MARŜIGI = IGI MARŜANTA.

Nu, kun verboj povantaj ricevi rektan komplementon, ĉu *igi* rilatas la *aganton* aŭ la *suferanton*, la subjekton aŭ la komplementon?

Cu *esperigi* = *igi esperanta*, aŭ *igi esperata*?

Analogio, logiko de la lingvoj, ordonas, ke tie ĉi ni alprenu saman regulon kiel antaŭe.

Do

ESPERIGI = IGI ESPERANTA.

Diru: « *Mi kantigas vin* », kiel oni diras: « *Mi kriigas vin* ». Ne diru: « *Mi kantigas himnon* ».

Sed kiel mi devos diri, se mi faras, ke vi aŭ iu persono ne nun montrata kantu himnon?

Unu sola respondo estas ebla, se ni ne volas kutimiĝi je uzado ne klara de Esperanto: disigu la sufikson, (jam multaj

komencas tiel skribi); Diru : « *Mi igas vin kanti himnon* »
aŭ nur « *Mi igas kanti himnon* ».

Resume :

MI LABORIGAS PRESISTON.

MI PRESIGAS PRESISTON.

MI IGAS PRESISTON PRESI LIBRON.

MI IGAS PRESI LIBRON.

Cu mi igis kompreni min ?

RENÉ DESHAYS.

MOVADO ESPERANTISTA

FRANĜA

S-ro Cornet, deputato de la departemento Yonne, baldaŭ proponos al la Parlamento la sekvantan leĝon :

« *La lernado de la lingvo internacia Esperanto estos de nun en la programoj de la Publika Instruado enhavantaj la instruadon de la modernaj lingvoj. Tiu ĉi lernado estos laŭvola, kaj la kandidatoj, kiuj prezentigas por la diversaj konkursoj kun unu el la lingvoj angla, germana, itala, hispana aŭ araba, rajtos aldoni al la nomitaj lingvoj la lingvon Esperanto. Ili profitos la samajn privilegiojn, kiel la kandidatoj petintaj, ke oni ekzameni ilin pri ne postulita lingvo.* »

La S. f. p. E. sendis al ĉiuj deputatoj leteron petantan, ke ili bonvolu subskribi la proponon ĉi supre presitan. Ĉiuj francaj grupoj kaj izolaj Esperantistoj estas plej energie kaj insiste petataj tuj skribi al siaj deputatoj kun sama peto ; ili ŝparu nenian penadon por helpi laŭ sia tuta povo al la akceptiĝo de tiu leĝo, kiu estus sendube la signalo de la definitiva venko de Esperanto.

La 23-an de Januaro, Generalo Picquart, Ministro de la Militistaj Aferoj, akceptis afable S-ron de Beaufront kun S-ro Cornet, aŭtoro de la ĵus citita projekto, Leŭtenanto Bayol, nia nun fama propagandisto ĉe la Ruĝa-Kruco kaj S-ro Rosey, pre-

zidanto de la Grupo Esperantista en Lisieux, kiuj priparoladis kun li projekton por helpi al la progresado de Esperanto en la armeo. La Ministro diris, ke li tre volonte helpos al Esperanto.

Paroladis por Esperanto multaj el niaj eminentuloj kaj propagandistoj. Novaj Grupoj fondiĝis en Armentières kaj Nogent-sur-Marne ; aliaj fondiĝas en Niort, Lisieux, Rueil, Saint-Armand-les-Eaux. En Tananarivo (Madagaskaro) fondiĝis grupo kun la oficiala permeso de la guberniestro. Ĉiusemajna kurso estas farata de la prezidanto Kapitano Fortin, kiu ankaŭ regule verkas artikolojn en la gazeto *Petit Courrier de Madagascar*. Krom la kursoj pri kiuj ni parolis en la lasta numero malfermiĝis ankoraŭ novaj en diversaj urboj, kiujn estas necble citi detale tie ĉi. Konsulejoj fondiĝis en Aix-les-Bains (konsulo : D-ro Coze, sekretario de l'Grupo.), en Beaume (librairie Piot.), en Charenton (D-ro Roblot, 8, rue de la République), en Lyon (D-ro Dor, 55, montée de la Boucle), en Nantes, Troyes, Roanne (S-ro Fortier-Beaulieu, 6, rue des Tanneries), en Tours (S-ro Patin, 5, rue Michelet). La 13-an de Januaro okazis en Parizo la solena disdono de l'premioj de la ĝeneralaj konkursoj de Esperanto organizitaj de la tiea grupo. La ceremonio okazis en la Sorbono, kiel la kunvenoj de la grupo, kaj estis prezidata de S-ro Max Vincent, vic-prezidanto de l'Franca Turing-Klubo kun S-ro de Beaufront. Multaj gazetoj raportis pri ĝi detale kaj eĉ enpresis la nomaron de la laŭreatoj. La grupo Pariza decidis imiti la bonan ekzemplon donitan de *La Barco*, invitante gaston al siaj ĉiumonataj vespermanĝoj. La unua gasto estis S-ro de Beaufront, kiu, je la deserto, interŝanĝis amikan toaston kun S-ro Bourlet, prezidanto de l'grupo. La internacia Asocio *Paco-Libereco* organizis en Parizo belan Esperantan feston la 20-an de Januaro. Aliaj festoj esperantistaj okazis ankaŭ en Commercy kaj en Lyon. Ni legis pri tiu ĉi lasta detalan raporton en la gazeto *Le Progrès*.

Inter la artikoloj pri Esperanto aperintaj dum la lasta monato en la franca gazetaro estas aparte rimarkinda tiu de Ferworulo (unu el niaj plej agemaj militistaj propagandistoj) en la 15-Januara numero de *Armée et Marine*. Ĝi estas titolita « La Esperanta movado militista » kaj ilustrita de multaj fotografajoj kaj portretoj de diversnaciaj oficiroj Esperantistaj. Ĝi verŝajne altiros al Esperanto multajn militistojn.

P. C.

BRITA

Bonan ekzemplon donas al ni la Angloj, propagandante en la plej diversaj societoj : ĉe laboristoj el *Social Democratic Federation*, en Bradford, kiel ĉe Unuiĝo por kristana propagando : *Christian Endeavour Society*, en Liverpool, ĉe la *Temperance Institute*, en Southport, kiel ĉe *Wesleyan Mutual Improvement Society*, en St-Helens. Ĉien ni devas enkonduki nian lingvon, kaj tion ni povas, precipe ĉar ĝi estas per si mem neŭtrala kaj apartenas al ĉiuj. — Tute rimarkinda do estas la rolo, kiun ludas sinjorinoj kaj fraŭlinoj en la tiea propagando; ŝajnas, ke pli facile ol en niaj centra-Eŭropaj ŝtatoj oni trovas en Anglujo virinojn, kiuj kuraĝas fari publikajn paroladojn. Ilin ni gratulu kaj imitu ! — Tion ankaŭ mi laŭdos, kion oni organizis en Londona klubo, kie oni disputas tute en Esperanto pri diversaj temoj antaŭe montritaj ; ĉiu klubano havas rajton paroli nur dum kvin minutoj kaj, kompreneble, ne ĉiuj parolas. Temoj elektitaj por la januara monato estis : Mortpuno, Socialismo kaj Individualismo. Ĉu konsilinde rakonti fablojn kaj legendojn al infanoj ? Pri la neceseco de sistematikaj korpaj ekzercoj, ktp. — Tre interesan leteron komunikas S-ro G. L. Browne, el Liverpool. Per tiu letero la Fermo H. St-Helens (Inkoj) sciigas pri la granda profito, kiun ĝi eltiris el dissendado de esperanta cirkulero.

« Laŭ mia opinio — skribis la direktoro de la dirita Fermo — la universala uzado de tiu ĉi lingvo ebligus al komercaj firmoj ŝparon ĝis multaj milionoj da funtoj sterlingaj, kaj evitus je la flanko de nia junularo multjaran studadon.

Mi parolas laŭ iom da praktika sperto, ĉar por fari la korespondadon de la firmo mi estis devigita oferi la tuton el mia libertempo dum dekkvin jaroj por la elstudo de fremdaj lingvoj, kaj en la nuna momento, post nur dudekono de la studtempo aldonita al aliaj lingvoj, mi preferas, pro ĝia supera simpleco kaj klareco, uzi Esperanton anstataŭ lingvoj, kiujn mi jam uzis de dudeko da jaroj.

Ĉar mi forsendas cirkulerojn verkitajn en dekkvin ĝis dudek lingvoj pro la neceso uzi apartan lingvon por ĉiu aparta lando, ĉe kiu mi havas aferojn, vi povos facile kompreni, ke la enkondukiĝo de universala lingvo uzebla ĉe ĉiuj landoj tra la mondo multe plifaciligus mian komercon, kaj malpliigus grandege la elspezojn. »

TH. C.

GERMANA

En *Germana Esperantisto* ni legas bonajn novaĵojn pri la propagando kaj la instruado de Esperanto en Germanujo. Multaj paroladoj estas faritaj en la lasta tempo. Grupoj fondiĝis en Bremen, Insterburg, Köln a. Rh., St. Georgental, Haida. Novaj kursoj malfermiĝis en multaj urboj. En Duisburg la granda instituto de Joh. Naumann, Königsst. 53, enkondukis Esperanton en la instruadon por estontaj komercistoj. Krom tio S-ro G. A. Radunsky instruisto de lingvoj en la instituto faris paroladon pri « La internacia helpa lingvo Esperanto, necesajo por la tutmondaj interrilatoj » en la ĉambrego de la instituto. Imitinda ekzemplo. La grupanoj en Stuttgart imagis bonan rimedon por propagando : ili kunvenas en la grupa sidejo nur unu fojon ĉiumonate ; la ceterajn semajnojn ili vizitas diversajn restoraciojn por propagando per interparolado en Esperanto. Multaj gazetoj daŭrigas raportoj favore pri la diversaj kursoj kaj paroladoj.

SVISA

La dua kongreso havis plej bonan influon al la disvastiĝo de Esperanto en Svisujo. Ĝi rekomenciĝis fervore la propagando, multaj novaj kursoj malfermiĝis kaj la nombro da membroj en kelkaj grupoj rapide kreskis ĝis duobliĝo. En Ĝenevo tiuj post la kongreso du publikaj kursoj estas komencitaj de S-ro M. Boubier, prezidanto de la ĝeneva Esperantista unuiĝo. Tiuj kursoj okazas en la Universitato kaj havas la plej grandan sukceson. La « Asocio de la komizoj en Ĝenevo » decidis enskribi Esperanton inter la kursojn donatajn publike de la Asocio. Ĝi komisiis tiun novan kurson ankaŭ al S-ro Boubier, kiu faras siajn lecionojn en la lokalo de la Supera Komerca Lernejo. Tiu ĉi fakto, ke la Asocio de la Komizoj en Ĝenevo, tre grava kaj kelkcentana societo, aliĝis publike al Esperanto kaj ĝin subtenas, donigante Esperantan kurson, estas unu el la plej signifaj kaj ĝojigaj, kaj estas promesplena por la sukceso de Esperanto en Ĝenevo. En Zürich fondiĝis konsulejo (Bahnhofstr. 46). Paroladoj estas faritaj de P-ro Christaller pri la Ĝeneva Kongreso kaj de S-ro Herz, prezidanto de l'tiea grupo, en la Unuiĝo de Bontemplanoj. Nova « Socialista Grupo Espe-

rantista » fondiĝis por propagandi nian lingvon inter la laboristoj. Per ĝi kurso estas farata de S-ro Jost kaj vizitata de 60 lernantoj.

SVEDA

Nia bonega kolego *Esperantisten* anoncas en sia decembra numero ĝojigan novaĵon tre gravan por la estonto de Esperanto en Svedujo. La 1-an de decembro fondiĝis en Stockholm la « Sveda Esperantista Societo », kies prezidanto estas S-ro Waldemar Langlet, vicprezidanto D-ro S. E. Krikortz kaj sekretario S-ro P. Ahlberg. Certe la nova societo gvidata de niaj malnovaj samideanoj, kies nomoj estas intime ligitaj kun la historio mem de Esperanto, potence helpos al la disvastiĝado de Esperanto en Svedujo. Al ĝi ni deziras tutkore plej grandan sukceson. Novaj grupoj fondiĝis en Göteborg, Stockholm (Klubo Esperantista de Laboristoj) kaj Ostra Gotland. En Stockholm D-ro Krikortz paroladis pri Esperanto en *Kulturella Ungdomsrörelsen* (Gejunula movado por Kulturaj Rilatoj). Kursoj estas malfermitaj de S-ro A. Nordwall en Stockholm por geinstitutoj kaj de S-ro Holmström en Eskilstuna. Multaj gazetoj favore raportis pri Esperanto. Inter ili estas aparte citindaj *Hallands-Posten*, *Sala-Posten*, *Korrespondens* kaj *Temp-laren*.

RUSA

En St. Petersburgo estas farata bona propagando en la Universitato, kie oni vendas esperantistajn eldonaĵojn dum la aparte vivaj momentoj de l'universitata vivo, ekz. dum ĝenerallaj kunvenoj de studentoj. Grupoj fondiĝis en Pskov, en Ostrogojsk, en Kiev, en Ardatov dank'al la energia agado de S-ro Saharov. En Moskvo ĵus fondiĝis « Moskva Societo Esperantista », kies prezidanto estas S-ro L. Titov (Adreso : Rusujo, Moskvo, Valovaja ulica, dom. Serpuhovskogo Monastyrja, kv. 5.).

HISPANA

En Burgos malfermiĝis kurso en la Komerca Cambro. S-ro Emmanuelo Esteban faris tie tre sukcesan paroladon, post kiu S-ro Ludoviko Cerral komencis kurson. En la sama urbo S-ro Manuel Esteban faras kurson en la Normala Lernejo de

Instruistinoj kun la permeso de la Universitata Rektoro de Valladolid. En La Guardia (Jaen) fondiĝas « Internacia Societo Pedagogia » por atingi la unuiĝon de ĉiuj ĝeinstruistoj de la tuta mondo kaj helpi al la morala kaj materia plibonigo de instruistoj kaj al la progresado de la pedagogiaj sciencoj. Novaj grupoj fondiĝis en Bermeo, Eibar, Salamanka, Portugaleta, Tortosa, Lugo, post parolado de S-ro Padilla, Cartagena, Simat de Valldigna, Medina del Campo kaj San Sebastian post parolado de leŭtenanto Julio Garrido. Ankaŭ paroladis kun granda sukceso en Benicarló S-ro J. Loira, direktoro de *La Suno Hispana*. En Valencia S-ro Ayza faras kurson al la militistaj oficiroj. En Santiago S-ro Carro Garcia faras kurson en la Normala Lernejo. Aliaj kursoj komenciĝis en Carcagente, Castellón, Benicarló, Coruña, Portugaleta, Lugo kaj Bilbao post parolado de S-ro Prados Urquijo. Konsulejoj estas organizitaj en Catellón (konsulo : S-ro Viktorino Aparici, Pi y Margall, 7), en Burgos (S-ro Teófilo Martinez, plaza Mayor, 45), en Bilbao (S-ro Prados Urquijo, Alameda de Mazarredo, num.1), en Santiago (S-ro Santiago Carro Garcia, strato Cantón del Toral, 6), en Coruña S-ro Pascual Perea kaj S-ro Romualdo González), en Barcelono (S-ro Johano Rosals, Portaferrisa, 30). La grava Korunja ĵurnalo *La Voz de Galicia* enpresas ĉiusemajne esperantan kronikon. En Sabadell la gazeto *Acció Catalana*, en artikolo presita Esperante kaj hispane, konigis sian intencon propagandi nian lingvon. En sia numero de l'2-a de Februaro ĝi anoncis Esperante kaj hispane kurson por virinoj kaj fraŭlinoj organizitan de la societo « Esperanta Semo ».

USONA

(Unnigitaj Ŝtatoj Amerikaj)

En la unua numero de nia nova kolego *The American Esperanto Journal* ni trovas bonajn novaĵojn pri la Esperantaj societoj en Boston, New-York, Philadelphia, kie fervore propagandas Profesoro Grillon, Chicago, Seattle, Los Angeles, Ohio, kie profesoro G. B. Viles de la Ohio Universitato senlace faras paroladojn kaj verkas artikolojn por Esperanto, Toledo, Cincinnati, Portland, Rockland.

En multaj urboj estas farataj kursoj kaj paroladoj. En Boston profesoro E. V. Huntington de « Harvard » Universi-

tato, kiu ĉeestis en la Geneva Kongreso, faris pri ĝi paroladon en la Universitato. En Chicago la gazeto *Chronicle* enpresas regule Esperantajn lecionojn. Bonega artikolo aperis en *Sunday Herald* de Boston okaze de la enkonduko de Esperanto en la lernejon Roxbury.

BRAZILA

Dank'al la konstanta laborado de la Brazila Klubo, Esperanto rapide disvastiĝas en Brazilujo. En la lasta tempo estas faritaj paroladoj, komenciĝis kursoj kaj fondiĝis grupoj en multaj urboj : Rio de Janeiro, Niteroj, Nova-Friburgo, Petropolis, Campinas, S. Paŭlo, Corytiba, Piracicaba, Batataes, Riberirao, Preto, Bello Horizonte k. a. En Rio de Janeiro fondiĝis konsulejo : la konsuloj estas Inĝeniero Everardo Backheuser, prezidanto de la B. K. E., Escola Politeknika, Largo de S. Francisco, kaj S-ro Raymundo Kantao (speciale por komercaj aferoj), rua dos Ourives, 107 (1-a etaĝo).

DIVERSLANDA

En Norvegujo la klubo esperantista de Kristiana bone progresas kaj havas nun 150 membrojn. — En Danujo sinjoro Erling-Steensgaard fondis esperantistan societon en Aarhus. — En Kanado, krom la malnova grupo « Progreso » en Montreal, ekzistas alia en Winnipeg. Nova grupo ĵus fondiĝis en Toronto.

P. C.

BIBLIOGRAFIO

Grand Dictionnaire Francals-Esperanto *rédigé en collaboration par un groupe d'Espérantistes sous le contrôle des revues LINGVO INTERNACIA et L'ESPÉRANTISTE. (Troisième fascicule).* 16 p. 29 x 26. — Paris, Presa Esperantista Societo, 53, rue Lacépède. *Prezo antaŭpagota : 17 fr. (Specimeno estas senpage ricevebla).*

Jus aperis la tria kajero tiel senpacience atendita de la *Portarego Franca-Esperanta*. Ĝi enhavas 557 vortojn, de Aierte ĝis *Anémique*. Aparte rimarkinda estas la artikolo pri la

verbo *Aller*, kiu plenigas unu tutan paĝon dukolonan 20 × 26, kaj en kiu estas detale analizitaj 16 diversaj sencoj de la dirita verbo kun multaj specialaj esprimoj. Kelkaj negravaj preseraĵoj facile korekteblaj estas bedaŭrinde lasitaj : *rekte voiri* anst. *rekte vojiri*, la *ŝipo maligiĝis*, anst. *malligiĝis*, *maldoĉa* anst. *maldolĉa*, *amasigi gerbojn* anst. *garbojn*, *ampolŝtelo* anst. *ampolŝvelo*, *filosofio* anst. *filozofio*,... Ankaŭ steletoj mankas antaŭ kelkaj devenigitaj vortoj, sed preskaŭ ĉiam la noveco de l'vorto estas montrita ĉe la radikoj mem.

La regula elirado de l'*Fortarego* estis ĝis nun tre malhelpata de diversaj teknikaj kaŭzoj. Dank'al nove farita aranĝo, la nova Administracio de la *Presa Esperantista Societo* povas certigi la mendintojn, ke *nun aperos ĉiujare 8 ĝis 12 kajeroj*, kiuj espereble fariĝos iam duoblaj.

La *Fortarego* enhavas tabelon de propraj nomoj kaj studaĵojn leksikologiajn kaj gramatikajn pri Esperanto redaktitajn de spertaj samideanoj.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch von HERMANN JÜRGENSEN. (*Zweite vermehrte Auflage*), 248 p. 10,5 × 16,5. — Berlin, Esperanto Verlag Möller & Borel, Prinzenstrasse. 95. *Prezo* : 2mk. (2.50 fr.) ; *bele bindita* 2.50 mk.

La apero de tiu ĉi dua eldono de la Esperanta-Germana vortlibro klare montras, kiom la Esperanta vortaro pli kaj pli riĉiĝas. Preskaŭ ĉiuj novaj vortoj en la vortlibro Germana-Esperanta troviĝas ankaŭ en la Esperanta-Germana, sed tamen ne ĉiuj ; ekzemple, el la sep vortoj cititaj en la recenza artikolo pri la vortlibro Germana-Esperanta, en nia lasta numero, du : *genero* kaj *megerino*, ne troviĝas en la Esperanta-Germana.

Tiu ĉi libro entute tre rekomendinda meritas tamen kelkajn negravajn kritiketojn. Apud tre utilaj vortoj, kiel *aserti*, *stulta*, *verzo*, ktp. troviĝas en ĝi tro da teknikaj vortoj tute senutilaj por la komuna publiko, anstataŭ kiuj oni trovus plezure bezonatajn komunajn vortojn, kiuj ankoraŭ mankas. Ĉu vere ne-teknikistoj tre bezonas la vortojn *rodiumo*, *ruteniumo*, *taliumo*, ktp. ? Kaj, se oni donas tiajn vortojn, kial ne doni ankaŭ *erbiurno*, *germaniumo*, *gluciniumo* k. a. ? Cetere kial diri (tre ĝuste) : *rodiumo*, *ruteniumo*, *taliumo*, kaj aliparte : *rubidio*, *stroncio*, *vanadio* anstataŭ *rubidiumo*, *stronciumo*, ktp. ? Ni lasu al la teknikistoj la teknikajn vortarojn kaj ne dikigu senbezone per ilia enmeto niajn komune uzatajn vortlibrojn. Ni memoru, ke la maldikeco de la vortlibroj estas unu el la plej bonaj allogiloj de Esperanto ; pri tio nin certigas la mirinda efikeco de la Ĉefeĉaj ŝlosiloj.

Multaj vortoj finiĝantaj per *ism*, kiuj estis donitaj en la unua eldono kiel memstaraj radikoj estas presitaj en la dua kiel devenigitaj vortoj, kvazaŭ *ism* estus unu el la Esperantaj sufiksoj. En la unua eldono oni trovis ekzemple : *optimism-o*, *pesimism-o*, *rojalism-o* ; en la dua oni trovas : *optim-ismo*, *pesim-ismo*, *rojal-ismo*. Sajnas al mi, ke oni ne rajtas doni en vort-

libro *-ismo* kiel esperantan sufikson almetitan al radikoj *optim*, *pesim*, *royal*, ĉar efektive *-ismo* tute ne estas esperanta sufikso. La ŝanĝo farita estas do malbona, tiom pli ke ĝi liveras tiajn strangaĵojn : tur-*o* (ronda konstruaĵo) kaj tur-*ismo* (plezura vojaĝado). Cetere la ŝanĝo ne estas ĉie farita ; apud *optim-ismo* kaj *royal-ismo* oni trovas ankoraŭ *idealism-o* kaj *teism-o*, kaj se oni ja povus devenigi *idealismo* de *idealo*, oni estas tamen feliĉa vidi ke *teismo* (kredo pri ekzisto de Dio) havas nenion komunan kun *teo* (trinkaĵo).

Kelkaj preseraroj : *dekadeno* anstataŭ *dekadenco*, *intervjuo* anst. *intervjuo*, *ĵapona*, ĉu ne *ĵapana* ?

P. C.

(Ni starigis por niaj legantoj tabelon de la novaj vortoj en tiu ĉi vortlibro, sed en la lasta presmomento ni devis decidi, pro manko de loko, prokrasti ĝian enpreson ĝis nia marta numero.)

Le Congrès Espérantiste de Genève de E. BOIRAC, 14-paĝa broŝureto 14 × 22. — Paris, Delagrave kaj Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. *Prezo* : 0.40 fr.

Tre interesa kaj grava raporto ne nur pri la kongreso en Genève, sed pri multaj punktoj, kiuj rilatas al propagando. Ĝi estis unue presita en kvazaŭ oficiala *Revue Pédagogique*.

Inter Blinduloj, konsiloj por uzado de ĵus blindiĝintoj, verkita france de D-ro EMILE JAVAL, esperantigita de lia bofilino S-ino JEAN JAVAL XIX-130 p. 12,5 × 18. — Paris, Hachette, 79, boulevard Saint-Germain. *Prezo* : 2 fr.

D-ro Javal blindiĝis, kiam li estis jam sesdekdujara. En tiu ĉi libreto li donas al siaj malfeliĉaj kunuloj multajn bonajn, praktikajn konsilojn, ne nur al ili, sed al ĉiuj personoj, kiuj vivas kun blinduloj. Tamen oni tute ne bezonas esti blinda aŭ vivi kun blinduloj, por ke la legado de tiu verketo estu interesa. tia estas la ĉarmo de parolo simpla, volonte naiva, ĉiam bonkora kaj afabla de plenscienca kaj modesta viro. Bona estas la traduko, kvankam iafaje eble tro klera, kun tro multe da prefiksoj *el* aŭ *ek*, kiuj ne simpligas la stilon, nek igas ĝin pli fluanta (Vidu p. 52 § 2). Mi diras nur *eble tro klera* : tian riproĉon oni ne povas fari al multaj !

Th. C.

Eneido de VIRGILIO, tradukis D-ro VALLIENNE : 271 paĝoj, 11 × 17. — Paris, Hachette, 79, boulevard Saint-Germain. *Prezo* : 3 fr.

Laŭverse tradukis S-ro Vallienne la latinan poemon kaj oni ne tro miros kaj laŭdos lian lertecon. Oni nur komparu la esperantan tekston kun la latina kaj oni konstatos, ke vere ĉiu verso estas bone, agrable kaj preskaŭ laŭvorte tradukita. Mi apenaŭ kuraĝas riproĉi al D-ro Vallienne lian teorion pri la

heksametro, kiu tamen, pro ĝia perfekta reguleco, fariĝas fine unutona, kiel nia franca aleksandreno, kaj tro senintermanke lulas la leganton. Kiom mi preferas la pli liberan heksametron de Kofman, en lia traduko de Homero, kaj kiom mi bedaŭras, ke kun tia talento, kiel estas la lia, S-ro Vallienne ne akceptis ĝin. Pri la unusilabaj vortoj mi plene konsentas kun la aŭtoro, ke unusilaba akcentiĝo ne ekzistas per si mem kaj naskiĝas laŭ la loko okupata de la vorto en la verso.

Th. C.

Wilhelm Tell, kvinakta dramo de SCHILLER, laŭ la versmetro de la germana originalo esperantigita de L. E. MEIER, 148 p. 12,5 × 19. Eldono de la Svisa Esperanta Societo, Basel 1906. *Prezo* : 1.70 fr.

La tradukinto estas tro sprita por ne kompreni min, kiam mi konfesos, ke mi preferas al lia tamen ofte tre lerta traduko la tekston mem de Schiller. Sed al tiuj, kiuj tute ne konas la germanan lingvon, tia verko povas certe alporti plezuron kaj instruon. Saman riproĉon mi faros al li, kiel jam faris aliaj kritikistoj : tre mallaŭdindaj estas liaj elizioj de *aj*, *as*, *an* ktp., kaj lia uzado de la vorteto *do* tute malagrabiligas certajn pecojn de lia traduko ; nur unu mi citos, la faman respondon de Tell al la tirano :

Ho ! — Per kio abomena
Vi *do* minacas min ? — Ĉu mi *do* celu
La kapon de infano mia ? — Ne,
Ne *do* ! Vi tion ne intencos ! Dio
Forigu ! — Tion vi *do* ne postulos
De patro serioze !

Li forigu en postaj tradukoj, kiujn li verŝajne donos al ni, tiujn *najletojn*, kiel oni nomas ilin france, kaj tre plezure ni laŭdos lian laboremon.

TH. C.

Tra Mez-Afriko, parolado kun projekcioj farita de Komandanto CH. LEMAIRE ĉe la dua Universala Kongreso de Esperanto en Genevo la 1-an de septembro 1906 ; 55-paĝa, grandformata (27,5 × 22), libro kartone bindita kun multaj fotografiaĵoj. — Bruges (Belgujo), A.-J. Witteryck, eldonisto, Nouvelle Promenade, 4. *Prezo* : 2.50 fr. ; *luksa ekzemplero* 3 fr.

Laŭ la prava diro de l'aŭtoro, tiu ĉi luksa verko estas la « modelo de l'estontaj eldonadoj ». La interesplena parolado de Komandanto Lemaire estas ja presita dulingve : sur la maldekstraj paĝoj troviĝas la franca teksto, kaj sur la dekstraj la Esperanta. Ĉiuj Esperantistoj volos posedi tiun ĉi altvaloran verkon : al la kongresintoj ĝi rememorigos plej agrablajn momentojn ; al la ne-kongresintoj ĝi ebligos iom partopreni image en la plezuro, kiun havis iliaj pli feliĉaj samideanoj, kaj

vidi siavice la interesajn fotografajojn, kiujn Komandanto Lemaire montris projekcie al siaj aŭskultantoj.

La verko de Komandanto Lemaire — unua parolado publike farita en Esperanto — estas plie bonega propagandilo por nia lingvo, ĉar ĉiuj skeptikuloj, kiuj legos la francan tekston, allogitaj de ĝia intereseo, nepre konvinkiĝos, ke lingvo kapabla esprimi facile tiom da diversaj ideoj kaj ofte sciencaj klarigoj, estas nedubleble la solvo de l'problemo de lingvo internacia.

P. C.

Methodisches Lehrbuch *der internationalen Hilfssprache Esperanto*, von JOHANN SCHRÖDER, VI-180 p. 12 × 17,5. — Wien u. Leipzig. A. Hartlebens Verlag. *Prezo* : 2 Mk. (2.50 fl.)

Tiu ĉi lernolibro estos precipe agrabla al tiuj, kiuj deziras plenan teorion gramatikon aranĝitan laŭ la klasikaj modeloj. Ĉiujn ĉapitrojn, kiujn oni trovas en latina, greka aŭ angla gramatiko oni trovas ankaŭ en ĝi. Certe mi ne plendos pri troa riĉeco, kaj, ĉar la verko estas zorge farita, mi povas nur laŭdi la verkiston.... Tamen mi bedaŭras, ke li ne pli plene klarigis kelkajn dubajn punktojn, kiel estas la uzo de *sia* post la participo aŭ la infinitivo, la signifo de la sufiksoj *igi* kaj *iĝi* aŭ la akuzativo post *kiel*. Pri lia teorio rilata al kondicionalo-optativo anstataŭ konjunktivo-imperativo mi ne konsentas. Post la teorio oni trovas ekzercojn, eble tro malmultajn, kelkajn poeziojn aŭ prozaĵojn, konversaciojn kaj sufiĉe plenan vortaron Esperanto-Germanan kaj Germano-Esperantan.

TH. C.

Kuracisto per Batoj, *triakta komedio de LEANDRO FERNANDEZ MORATIN, esperanten tradukis VINCENTE INGLADA* : 54-paĝa broŝuro 10,5 × 15. — Biblioteko de « La Suno Hispana », S-ro A. Jimenez Loira, Paz, 20, Valencia. *Prezo* : 0.50 ptoj.

Ne de Moratin, sed de Moliere, kies komedion *Le Médecin malgré lui* preskaŭ laŭvorte, de la komenco ĝis la fino, tradukis la hispana verkisto. Bedaŭrinde estas, ke S-ro Vincente Inglada tion ne diris en antaŭparoleto. Aliparte oni povas nur gratuli la esperantistan tradukinton, kiu kun plej granda sukceso uzas internacian lingvon. Ĉu li ne tamen tro ofte, laŭ hispana kutimo, anstataŭas *tial ke* aŭ *ĉar* per *simpla ke* ?

TH. C.

Belega Skotlando, *vidajoj, naciaj karakterizoj, ktp.* : 30-paĝa broŝureto 9 × 12. — Higgie & Co., presistoj kaj eldonistoj. Rothesay, Glasgow, Skotlando. *Prezo* : unu penco.

Interesa gvidlibreto, enhavas multajn informojn pri Skotlando, ĝiaj vidindaĵoj kaj kuriozaĵoj.

Verba Amuzajo, verkita de Esperantisto N-ro 10.072 ; 8-paĝa broŝureto 10,5 × 15. — Valencia, Pubul y Morales, editores, Avellanas, 7. Prezo : 0.10 ptoj.

Rakonteto, en kiu la aŭtoro uzis ĉiujn formojn de l'verbo *ami*.

Cent dek tri Humorajoj, verkitaj aŭ esperantigitaj de ESPERANTISTO N-ro 10.072 ; 32-paĝa broŝureto 11 × 15. — Valencia, Pubul y Morales, editores, Avellanas, 7. — Prezo : 0.40 pezet.

Amuza kolekto da spritaĵoj kaj humorajoj.

Kristnasko, poezio de TH. GAUTIER, esperantigita de D-RO PHILIPPET. Muziko de S-RO L. RIGOIR, 4-paĝa, tre bone litografiita, kun bela kovrilo. Ĉe l'aŭtoro : L. Rigoir, 20, rue des Ormes, Charenton (Seine), France. Prezo : 1 fr. 50 (per poŝto : 1 fr. 55.)

La tradukisto sendis al la muzikisto la jenajn komplimentojn : « Mi al vi sendas dek mil dankojn kaj gratulojn. Vi ja bone komprenis kaj muzike tradukis la delikatajn versojn de Th. Gautier. — La unua akto (mi povas diri *akto*, ĉar via muzikajo estas kvazaŭ teatraĵeto), estas apetitdona ; la dua, pentranta ; la tria, ploriga, frost-tremiga ; la kvara konsola, gajiga, triumfa. — Brave ! vi prenis ĉefverkon por doni al ĝi muzikan vesteton, kiu estas mem admirinda ĉefverko ! »

Allaj verkoj ricevitaĵ preparolotaj en venontaj numeroj : — *Per la lingua internazionale* de L. Couturat. — *Histoire de la Langue Universelle* de L. Couturat kaj L. Leau (represita). — *Al la virinoj* laŭ Urbain Gohier. — *Sinjoro Badin* de Georges Courteline. — *La Kalendaro* de Lengyel Pál. — *La Katolikoj Esperantistoj ĉe la dua Kongreso*. — *Pri la Homa Radiado* de E. Boirac. — *Eine Weltsprache oder drei*, de L. Couturat. — *Corrigé de l'Ekzercaro*, de L. de Beaufront. — *Franca Gramatiko por Esperantistoj*, de Paul Boulet.

GAZETARO ESPERANTISTA

Novaj gazetoj.

Dum la monato Januaro ni ricevis la unuan numeron de la sekvantaj gazetoj : *Časopis Českých Esperantistu*, *The American Esperanto Journal*, monataj propagandaj gazetoj por Bohemujo kaj Ameriko, kaj *Internacia Socia Revuo*, nova faka gazeto en Esperanto. (Vidu pri ili plenajn informojn sur nia kovrilo). Al niaj novaj kolegoj koran bonvenon kaj plej grandan sukceson !

Estas anoncita la baldaŭa apero de *Eksport-Jurnalo*, Revuo por komerco, industrio kaj tekniko (Frankfurt a. M., Guttenstrasse, 96), *Gazeto Matematika Internacia* (F. J. Vaes, Mathenesserlaan, 290, Rotterdam, Holland), kaj la reapero de *Esperanto-Jurnalo*, en ŝanĝita formo, kiel organo de la Esperantistaj Konsulejoj kaj Oficejoj (S-ro H. Hodler, 8, rue Boyv-Lysberg, Genève).

Car, kiel oni vidas, la nombro de la Esperantistaj gazetoj senĉese pligrandiĝas, detala analizo de ilia enhavo sub tiu ĉi rubriko okuĝus tro da loko en nia gazeto. Tial, de nia marta numero, ni raportos nur pri la plej gravaj kaj komuninteresaj artikoloj trovitaj en la gazetaro.

*
* *
*

L'ESPERANTISTE (*Decembro*). — La tria kongreso : informoj pri la tria kongreso en Cambridge. La *Union Society*, klubo de la Universitataj studentoj decidis akcepti la Esperantistojn kiel honorajn membrojn dum la kongresa semajno. Ĝia *Debating Hall* (paroladejo), kvazaŭ Universitata Parlamentejo, estos disponebla por la kongresanoj. Malofta favoro ! S-ro de Beaufront prezentis oficialajn dankojn al la Universitata Konsilantaro kaj al la *Union Society*. — Qu'a fait, que fait la S. f. p. E. ? (Kion faris, kion faras la S. f. p. E.) de Informito. Memorigas la forgesemulojn pri la grandaj servoj faritaj kaj farataj de la S. f. p. E. por la disvastigado de Esperanto. — Société Française pour la propagation de l'Esperanto : Novaj kandidatoj. Chronique. — Kroniko fremdlanda. — Franca Movado. — Bibliografio. — Cours d'Esperanto. — Internacia korrespondado Esperanta (I. K. E.). — Amuzajoj.

THE BRITISH ESPERANTIST (*Januaro*). — Nia bona kolego sin vestis feste por la tria kongreso, ĝia kovrilo estas nun pli fortika, ĝia papero pli bona, ĝia teksto ĉiam in-

teresa. La aparta aldono ne ekzistas plu. — Nova Jaro. — La tria Kongreso. Krom la informoj ankaŭ presitaj en *L'Esperantiste*, la Trio sciigas ke Sia Urbeŝtrino Moŝto en Cambridge afable konsentis prezidi la Akceptan Komitaton por Sinjorinoj. Ĝi havos kredeble pluajn kuraĝigajn sciigojn por anonci post mallonga tempo. *Oni respondu pri la demandoj raportitaj en nia lasta numero.* — Congress guarantee fund. — Chronicle. — Forward. — Alilanda Kroniko. — Recent lectures. — Granda internacia ekspozicio en Irlando. — Konsilantaro B. E. A. — Agada Komitato. — Internacia ekspozicio stenografia en Szeged, 1907. — Libraro kaj Gazetaro. — La neĝo. — Diversaĵoj. — Kiamaniere vivadi. — New members. B. E. A. — Pri kelkaj antaŭhistoriaj gravuraĵoj. (Clarence Bicknell). — Mi mem. (E. J. Fooks). — Heartly Congratulations. — Pedagogoj-tondistoj (trad. Sam. Meyer). La tertremo en Valparaiso (trad. de Pastro J. B. Rust). — George Stephenson, elpensinto de la Locomotivo (trad. de Alex. Pride). — Ĉu Esperanto aŭ la angla lingvo? (artikolo de S-ro de Beaufront represita el *L'Esperantiste*). Por la infanaro (Esp. 7124). — Respondoj al korespondantoj. — Fako de korespondado internacia (F. K. I.). — Komercaj firmoj, hoteloj, k. c., kiuj korespondas Esperante.

GERMANA ESPERANTISTO (Januaro). — Oficiala parto : Al niaj Amikoj! — Neoficiala parto : Al la legantoj de *Germana Esperantisto*. Dankoj kaj bondeziroj al la abonantoj kaj kunlaborantoj. La gazeto aperas nun kun aparta aldono literatura « *Liberaj Horoj* » aparte abonebla, kiu entenas facilajn tekstojn en Esperanto kaj germana lingvo kaj praktikan frazeologion de la ĉiutaga vivo ankaŭ en ambaŭ lingvoj. — Poŝtrigardo. (S-ro J. Borel). El germanlingvaj landoj. — Gazetaro germana. — Die Esperanto-Bewegung im Auslande. — Diversaj sciigoj. — Delegitaro por la enkonduko de Lingvo Internacia. — Bücherschau. — Silvestra rakonteto.

Liberaj horoj : La honesta fripono. — Frederiko la Granda kaj lia ĉambristo. — La leono kaj la tigro. — La grilo kaj la najtingalo. — Frazeologio de la ĉiutaga vivo : Pri fremdaj lingvoj.

LA BELGA SONORILO (6 Januaro). — Blinda Rozo (D-ro M. Seynaere.). — Delegacio por alpreno de internacia lingvo helpanta. — Belga ligo Esperantista : ĝenerala kunveno de la Komitato. — Idei international. Pri nova revuo tiel titolita kaj redaktita en « lingvo european », nova speco de ŝanĝita « Idiom neutral ». — Bibliografio.

(20 Januaro). — Ĝis la Revido ! Adiaŭoj al Komandanto Lemaire, kiu komencas novan vojaĝon al la « Kontinento Nigra ». — Nova Jaro. — Kroniko de la Grupoj. — Horo de Morto (Leo Belmont). — Kaskalkulo 1905-1906 de la B. L. E. — Tra la Mondo Esperantista : Triliniaj novaĵoj. — Al la internacia helpanta lingvo. Propaganda artikolo de Komandanto Lemaire aperinta en *L'Indépendance Belge*. — Klarigo. Pri la es-

primo « bonaj bondeziroj ». — Reciproke. — Instituto pri internacia leĝoscienco. — Reĝo kaj Esperanto. Informas laŭ la gazetoj *The Daily News*, *La Suno Hispana* kaj *The Daily Chronicle*, ke la reĝo Eduardo VII-a plezure akceptis Esperantajn lernolibrojn de S-ro O'Connor, ke la greka reĝo estas fervora amanto de nia lingvo, kiun li propagandas en sia familio kaj ke la princo Olaf el Norvegujo lernas Esperanton, kiel la princoj de la Reĝa familio Angla. — Kuirejaj ordonoj (receptoj) : Skotlanda Potsupo (Vatelino) — Diversaĵoj. — « Wallona » rakonteto : La puno de la lupoj (trad. de D-ro Melo). — Bibliografio.

RUSLANDA ESPERANTISTO (*Novembro*). — Kristanoj (de Leonid Andrejev, trad. de Petro Vinogradov). — Ben-Tovit (de L. Andrejev, trad. de Sirotin). — Arbaron oni hakas (de l'poetino Gálina, trad. de Vs. Lojko). — Li eniru ! (de V. Gomulicki, trad. el la pola lingvo de N. Novicki). — Esperantista Movado. — Nekrologio. — Al membroj de Societo « Espero ».

ESPERANTISTEN (*Decembro*). — Je la interjaro. — Esperanto en Nordo (P. Ahlberg). — Pri aliĝo al S. E. S. — Esperanto i utlandet. — Esperantokonsulat. — Diversaj informoj. — Bibliografio. — La infanoj banantaj (de V. Rydberg, trad. de G—r L—k).

IDEALO (*Decembro*). — La unua Sicilia Esperantistino. — Ĉirkaŭ la laktovazo. Rakonto de Luis Carlos. — Kroniko Esperantista. — Bibliografio. — Grava Alvoko al ĉiuj Esperantistoj Astronomistoj. — Internacia Koresponda Societo.

LA SUNO HISPANA (*Januaro*). — Dua universala kongreso Esperantista en Ĝenevo (daŭrigo). — La lasta folio (Poezio de V. Inglada). — Sciigoj (Kroniko). — Cirkulero de la Organiza Komitato de Internacia ekspozicio stenografia en Szeged, 1907. — Novaj anoj de H. S. P. P. E.

CASOPIS ĈESKYCH ESPERANTISTU (*Januaro*). — Našim ĉtenarum ! — Al niaj legantoj. La Redakcio difinas sian planon kunigi la izolajn bohemiajn samideanojn kaj helpi tiel ilian organizadon. — Rememoroj de l'Esperantistino. — Kroniko nacia. — Cizi kronika. — Bibliografio. — Raportoj pri bohema nacio.

UNUA PASO (*Decembro*). — Ne kantu !... (poezio de H. H. Rjaĥovski). — « Ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion... » de H. T. Rjaĥovski. Komparinte la paroladon de D-ro Zamenhof en la dua kongreso kun lia deklaro akceptita en la unua, la aŭtoro demandas sin « Ĉu la vortoj en la « deklaro » estas nur vortoj sen ia signifo, aŭ ni ankoraŭ ne sekvas nian celon nek nian vojon ? Ĉu ni ankoraŭ devas miksi la ilon kun ideo ?..... La ilo neniam estis ideoportanto aŭ ideohav-

anto..... Nek telegrafo, nek telefono, nek fervojo iam portis aŭ enhavis ~~ian ideon~~..... Tamen, se la aŭtoro de la lingvo kreis ĝin pri ia ideo, mi ~~havas opinion kontraŭ~~ lia ideo ; li povas uzi tiun ĉi belegan kaj genian ilon pri ~~sia ideo, same kiel~~ ni uzas ĝin pri niaj ideoj.... ». — De la Redakcio. Sciigas, ke la Bulgaraj Esperantistoj decidis fondi Bulgaran propagandan ĵurnalon por Esperanto. Por ke la fortoj de la Bulgaraj Esperantistoj ne disiĝu, la Redaktoro de *Unua Paŝo* decidis ĉesigi la eldonadon de sia gazeto. Li laboros kune kun la redaktantoj de la nova ĵurnalo por la disvastigo de Esperanto en Bulgarujo. — Unu nokto (de C. trad. de G. Nikolov). — Kroniko. — Ekspozicio de la Grupo Esperantista « Vekiĝo » en Sumen (Vekiĝano). — Esperanta librejo. — Internacia Korespondada Societo.

LA PIONIRO (*Novembro*). — Histoire de la Langue Universelle (A translation). — Kristnaskaj salutoj. — Esperantaj notoj. — Amuzajoj. — Duelo per la poŝto. — Eltirajo el la « Guĝrati » literaturo. — Progress. — Gazeto Esperantista. — The delegation for the adoption of an international auxiliary language. — Esperanto for soldiers and sailors. — Esperantistaj organizoj indiaj. — Morto por la amo. — A concordance to the « Fundamenta Krestomatio ». Rawalpindi five-rupee prize. — The Rawalpindi Esperanto Club. — Interkorespondado kaj interŝanĝo. — New Books, etc. Nove geedziĝinta paro.

ANTAUEN ESPERANTISTOJ !! (*Novembro*). — Leĝo protekta por nia Revuo : La Redaktoro de la gazeto interparolis private kun la Prezidanto de la Respubliko pri la projekto jam akceptita de la deputatoj kaj senatanoj doni al l'administracio de *Antaŭen Esperantoj !!* kvin sterlingajn funtojn ĉiumonate interŝanĝe por kvindek ekzempleroj de la gazeto, kiujn la Ministro de Instruado disdonigos en la lernejoj. La Prezidanto de la Respubliko diris « Ke li estas amiko de Esperanto kaj proklamas tuj la leĝon, kiam li ricevos la aŭtografon senditan de l'Kongreso kaj ke ne estis necese paroli al li pri tio. ». — Konsulejoj. — Esperantista Centra Oficejo. Parolado de D-ro Zamenhof ĉe la dua Kongreso (daŭrigo). — Kroniko. — Bibliografio. — Preseraro (?).

THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL (*Januaro*). — Prezento de l'gazeto al la legantoj. — Kelkaj vortoj pri la historio de Esperanto. — Kial Esperanto estas facile lernebla. — Advice to beginners. — Pri la leteroj senditaj de niaj fremdaj amikoj. Leteroj de D-ro Zamenhof kaj de S-ro de Beaufront. — La tutmondaj kongresoj Esperantistaj. — Kolumbio, juvelo de l'maro (poezio de Rev. A. Krafft). — La unua psalmo (el la hebrea lingvo trad. de W. B. Serett). — Interparoladetoj. — Esperanto en la Geneva Kongreso ; kelkaj impresoj (Prof. Grillon). — Letero de J. Borel, redaktoro de *Germana Esperantisto*. — La ligna kruro (Prof. Grillon). — La viro senpatruja (trad. de E. L. Robinson). — Kroniko. — Koresponda

fako. — La senharulo (el *The British Esperantist*, trad. de H. Clegg). — Acknowledgment of subscriptions.

L'AMERIKA ESPERANTISTO (*Decembro*). — Parolado de D-ro Zamenhof en la malfermo de la Ĝeneva Kongreso. — Ni varbu la gazetaron ! — Pri kio ni devas paroli ? — Al Esperantistoj Astronomiistoj. — La gerania branĉo (el *L'Espé-
rantiste*, trad. de S-ino Ilse Frapeau). — Noteto pri la vortoj *delegacio*, *biblioteko*, ktp. anstataŭ *delegitaro*, *libraro*.

JUNA ESPERANTISTO (*Nov-Dec.*). — La verda feino (L. Carlos). — La Barbo Blua. — Movado Esperantista. — Migranta familio (de Masson-Forestier, trad. de L. Touchebeuf). — Songo (Poezio de Lermontov, trad. de R. Frenkel). — Buŝa uzado de Esperanto (kun du ilustraĵoj).

(*Januaro*). — Al niaj legantoj bonan kaj feliĉan jaron ! — Cu ĝi ŝanĝas ? (Prof. Grillon). — Mia bonfaranto (El Heire, trad. de Leo Belmont). — La eltrovo de Ameriko (Hugo Re-
agéczy). — La stelo (H. Wells). — Amuzaĵoj. — Problemoj.

LA REVUO (*Februaro*). — N. V. Gogol : La Revizoro (Akto kvina) el rusa lingvo tradukita de D-ro Zamenhof. Kel-
kaj rimarkitaj esprimoj : Nun mi ilin *prilaboros*, la kanaj-
lojn ! — La malbenitan *judan* popolon. — Skribistojn, kiuj *arti-
fikadis* por ili petoskribojn. — *Arĥifriponoj*, *protokanajloj*, ma-
raj *trompisto* ! — *Klakus* per la lango. — Anna Andrejevna efek-
tive atendis bonan *partion* por sia filino. — Jen efektive, tiel
destinis la sorto. — *Krevu* kaj pereu ! — Vi aŭdis, kiel ŝi min
traktas ? — Forsendi la leteron per *ekspreso*. — Teruraj *origi-
naloj* ! (En antaŭa akto troviĝas : Granda *originalulo* li estas).
— Troviĝos *plumknaristo*, *paperŝirmisto*... — vi, *krakiloj* mal-
benitaj ! — *Mi frotus vin ĉiujn al faruno* kaj al la diablo *mi do-
nus vin ĉiujn por subŝtofo*.

Edgar Allan Poe : Puto kaj pendolo, laŭ la angla teksto
esperantigita de R. C. Bourcard. En tiu ĉi artikolo S-ro Bour-
card uzis la bedaŭrindajn *eksidi* kaj *ekstari*. — Lozo : Amoro
kaj Mercurio. — F. Pujulá-Valjes : Senhejmulo, Monologo dek-
lamita de la aŭtoro dum la dua prezentado de la dua Kongreso
en Genevo. — Ch. Lambert : Sakuntala kaj la Hinda Teatro
(daŭrigota).

Respondoj de D-ro Zamenhof : *Pri la prefikso « ge »*. Ĝi
estas uzebla ne nur pri du samfamiliaj personoj, sed ankaŭ pri
personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj. — *Pri la kazo post
« kiel »*. Diru : « Mi elektis lin kiel prezidanton » en senco de
« kiel oni elektas prezidanton » aŭ « por havi en li prezidan-
ton ». Diru : « Mi elektis lin kiel prezidanto » en senco de
« mi elektis lin, ĉar mi estas prezidanto » aŭ « en tia manie-
ro, en kia prezidanto elektas ». — *Pri la vorto « tiela »*. Kiam
oni volas uzi la sencon de « tia » aŭ « tiel » en formo *pli ak-
centita*, oni povas uzi « tiela » kaj « tiele ». — *Pri la lingvaj
demandoj* en « La Revuo ». En ĝi nur D-ro Zamenhof verkas

lingvajn artikolojn, sed ne estas malpermesite al iu ajn paroli pri lingvaj demandoj en aliaj gazetoj. — *Pri miaj respondoj.* Ne sendu demandojn pri lingvaj punktoj rekte al D-ro Zamenhof, sed al la Redakcio de *La Revuo*, kiu sendos al li la plej interesajn. — Bibliografio. — Kroniko.

En tiu ĉi numero finiĝas « La Revizoro » samtempe kun la unua jarduono de *La Revuo*. En ĝiaj ses unuaj numeroj troviĝas 30-foje la verboj *sidiĝi* aŭ *stariĝi* kaj 18-foje *eksidi* aŭ *ekstari* :

Sidiĝi aŭ stariĝi.

D-ro Zamenhof	29 foje.
Ceteraj Aŭtoroj	10 —

Eksidi aŭ ekstari

D-ro Zamenhof	0 —
Ceteraj Aŭtoroj	18 —

Uzis sidiĝi aŭ stariĝi :

D-ro Zamenhof, E. Boirac, Ch. Lambert, Fr. Schneeberger, P. Corret.

Uzis eksidi aŭ ekstari :

G. d'Aulnave, F. Pujulá-Valjes, C. Bourlet, R. de Lajarte, S.ino Vallienne, C. R. Bourcard.

TRA LA MONDO (*Januaro*). — Nuntempaĵoj : Kruelego maroka, de Pierre Loti, esp. de E. Bacquet (Francujo). — Diversaĵoj : La Piloloj de Doktoro Kohol, de Hans Romanowcz, kun ilustraĵoj de A. Raschka (Aŭstrujo). — Felietono : Poŝta Amo, de Johano Munoz kaj Pabon, kaj Johano García Martin (Hispanujo). — Tertremo, de Amfiteatro (Rusujo) kaj Leo Belmont (Polujo). — Literaturaj paĝoj : Literatura Kroniko, de P-ro Bucquet (Francujo). — Pri Esperanto : Cambridge, la urbo de l'tria Kongreso, de Pastro J. C. Rust (Anglujo). — Kroniko. — Bibliografio, de Steleto, Legadamiko, A. Montrosier. — Militistaro kaj Maristaro : Esperanto kaj Ruĝa Kruco. — Scienca Kroniko, de Marcel Finot (Francujo). — Virina paĝo : La modo, de Rokzano. — Ĉiulandaj kutimoj : Knabina vivado, de C. Steenbuch (Japanujo). — La Harakiri, de Ch. Petit kaj P. Diffre (Alĝerio).

Kiel scias niaj legantoj, nia bonega kolego *Tra la Mondo* malfermis enketon pri edukado. Multaj dokumentoj alvenis el 13 diversaj landoj. S-ro Th. Rousseau, doktoro de sciencoj verkis pri ili raporton, kies enpresado komenciĝos en la Februara numero. Ni rekomendas al niaj legantoj la legadon de tiu ĉi raporto, ĉar ĝi interesos ĉiujn homojn : gepatrojn kaj infanojn, geinstruistojn kaj geedukistojn. Ĝi estos plie bona armilo por

propagando, ĉar ĝi montras praktikan aplikon de Esperanto. Multaj ilustraĵoj pligrandigos ĝian allogon ; ĝia publikigado daŭros kvar monatojn.

INTERNACIA SCIENCA REVUO (*Decembro*). — Al niaj legantoj. — H. Ramier : Evolucio de l'monda komercado. — H. Dehéran : La Hereroj. — V—d L—o : Japanino. — Morel : Fuenterrabio. — H. R. : La morto de Kant. — Leroy-Beaulieu : La Nord-Amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj en la XX-a jarcento. — Analizoj, notoj kaj informoj.

FOTO-REVUO INTERNACIA (*Januaro*). — Karlo-Verks : Densigo kaj heligo de fototipoj. — H. Reeb : Fiksado de fotografaĵoj (daŭrigo kaj fino). — K. Verks : La Rivelado de negativoj (daŭrigo kaj fino). — D-ro R. A. Reiss : Revidigo fotografe de krajona skribaĵo. — Fj. Wazsewski : Forpelo de hiposulfito. — Fotografa turismo : La ŝtonaj virinoj, de A. Pendire. — The Photogram : Platenpapero por sepiaj tonoj. — The American Machinist : Pantografo por numerigi la kliŝojn. — Receptoj kaj Formuloj. — Korespondado. — Nova fotografa vortareto.

ESPERO PACIFISTA (*Novembro*). — Vasilij Golbec : Honto. — Tutmonda manifesto por la senarmigo ; grava alvoko. — La Societo : Pri anoncoj en « Espero Pacifista ». — Pariza Grupo. — Novaj aliĝoj. — Mono ricevita. — Miksaĵoj. — Pacifisma Movado : Parolado de ĉefministro Campbell-Bannerman ĉe la 14-a Parlamenta Konferenco. — Socialista Interparlamenta Kongreso. — Instituto de Internacia Juro. — Asocio de internacia Juro. — Aŭstrujo : Nova Societo. — Konkursoj starigitaj de la delegitaro de la Francaj Societoj de Paco. — Franca Ligo de la Rajtoj de l'Homo. — La Germana Societo de Paco kaj la festo pri Sedan. — Pacifisma kunveno en Strasburgo. — Esperanta german-slava kongreso en Allenstein. — Hispanujo. — Hungarujo. — Esperantista Movado. — Notoj diversaj. — Libroj. — Nekrologio : Elie Ducommun.

INTERNACIA SOCIA REVUO (*Januaro*). — La vilaĝanoj agristoj en Rusujo, de Amiko. — La Feliĉo por la Proletarioj, de J. Nys. — Pripensado pri la Individualismo, de M. Devaldès. — Kontraŭ la Rusa prunto, de V. Richard. — Sociaj kaj politikaj partioj ĉiulandaj. — Socia Movado. — Esperanta Movado.

ESPERANTA LIGILO (*Januaro*). — Al amikoj (Th. C.). — Poezio : Sub la faldoj de nia standardo (Fino Zabylon d'Her). — La matenmanĝo (Grabowski). — La kampo de la morto. — Feliĉono : Perdita kaj Retrovita (Boirac). — Problemoj, Humoraĵoj, ktp.

Al la Esperantistaj Konsuloj.

S-ro Sam. Meyer dissendis cirkuleron al ĉiuj esperantistaj konsuloj konataj de li. Tiuj, kiuj ĝin ne ricevis, bonvolu konigi sin. Sufiĉos se ili sendos vizitkarteton kun sia adreso al S-ro Sam. Meyer, esper. Konsulo en *La Rochelle* (Francujo).

Al la Esperantistoj Sportistoj.

La franca ĉiusemajna gazeto *Tous les Sports* (Ĉiuj sportoj), oficiala organo de *Union des Sociétés Françaises de Sports Athlétiques* (Unuiĝo de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj), enpresos de nun ĉiusemajne esperantan kronikon pri la ĉefaj sportaj okazintaĵoj.

Nia samideano S-ro René Isambert, sekretario de la Grupo Esperantista de Chartres, kiu kunlaboros en la redaktado de tiu esperanta kroniko, estus tre feliĉa konsiliĝi kun diversnaciaj kompetentaj Esperantistoj sportistoj por elekti la necesajn teknikajn vortojn kaj esprimojn rilatajn al la diversaj sportoj.

Oni bonvolu skribi rekte al li : S-ro René Isambert, *Chartres*, (Eure-et-Loire), Francujo.

Al la Esperantistoj Botanikistoj.

Profesoro J. Meazzini intencas prepari botanikan terminaron en Esperanto. Tiuj el niaj samideanoj, kiuj estas kompetentaj pri botaniko, bonvolu skribi al li : P-ro J. Meazzini, *Arezzo*, (Italujo).

Al la Esperantistoj Studentoj.

Ĉiuj studentoj-esperantistoj aprobantaj la ideon de fondo de *Tutmonda Studenta Grupo* estas petataj skribi al S-ro R. Sakoviĉ (Societo « Espero », Bol. Podjaĉeskaja, domo n. 24, St-Peterburgo, Rusujo), aldonante, se eble, poŝtmarkon por respondo.

Al la Kolektantoj de Poŝtkartoj.

En Macon fondiĝis internacia *Amika Asocio de gekolektantoj de ilustritaj poŝtkartoj*. Por sciigoj sin turni al S-ro A. Cottet, sekretario, 7, rue des Chantiers, *Macon* (Francujo).

Korespondado.

Al multaj korespondantoj. — Koran dankon por viaj kuraĝigaj gratuloj. Ni penados pli kaj pli ilin meriti.

Al niaj anoncontoj. — Ni atentigas, ke de nun ĉio konceranta la anoncojn devas esti sendata nur al S-ro G. Warnier, 46, rue Sainte Anne, Paris, *eksklusiva agento*. Vidu la tarifon sur la 2-a paĝo de nia kovrilo.

S-ro E. S. M—r, Edinburgh. — Dankon por via reabono. Nun ne estas plu necese skribi sur la mandatojn la nomon de de pagonta poŝtofiĉejo.

S-ro A. L—r, Paris. — Ne miru, ĉar vi ricevis kun *L. I.* la *Literaturan Aldonon*, kvankam vi ne abonas ĝin. Tio ĉi ne estas eraro. Ni decidis ĝin sendi kiel specimenon dum tri monatoj al tiuj el niaj legantoj, kiuj ĝin ne abonas, por ke ili konu ĝin bone kaj povu ĝin aboni, se ili trovos ĝin interesa.

Monoferado por la Blinduloj (ĝis la 31-a de jan.)

S-ino Lagoguey 10, S-ro Leprieur 5, Anonimo 0.15 c. S-ro Hachenburger 1, S-ro Otto Simon 30, S-ro Mercer Hollis 25, F-ino R. 0.80 c., S-ro Bresson 5. — Vendado de libroj 24. Sumo 100,95 fr.

Alvoko al Kolegoj el Esperantista Gazetaro.

Mi estus danka al niaj kolegoj, se ili bonvolus atenti pri tiu deziro, kiun mi enmetis en finon de mia RAPORTO PRI ESPERANTO INTER BLINDULOJ. Se la gazetistoj ne helpos al mi, ĉiu en sia lando kaj por siaj kunlandanoj, la sukceso tute ne estos ebla.

« Ciu nacia gazeto esperanta kolektu monsumon por pli-
« **faciligi al kelkaj blindaj esperantistoj** el sia lando la venon al
« proksima Kongreso (en Cambridge), kie, laŭ mia espero, ni
« povos havi ĝeneralan kunvenon de esperantistaj blinduloj, —
« facile 40 aŭ 50 ili povus esti. »

TH. C.

Problemoj.

— De *pd.* —

IV. — Korrektu la preserarojn en la sekvantaj vortoj : rafe, mando, ao, cero, verti, kabo, senci, cilo, aoko, nk, reni, mesto, past. — La enŝovotaj literoj, legataj lauvico, donos la titolon de unu fama verko Esperanta.

V.

UUUUUUUU LLLLLLLLLLLL OOOOOOOOOOOOOOOOOOOOO

VI. — Dfou mfufsrbrfŝpko lvo ŝjb opnp. — Trovu rimedon iamaniere komprenebligi tiun ĉi strangajon ; — ĉiu solvanto de tiu ĉi problemo ricevos cent leterpaperojn kun sia nomo.

Ŝarado. — Per kelkaj vortoj ni jen klarigas, kio estas ŝarado, — supozante, ke troviĝas personoj inter niaj legantoj, kiuj ĝin ne konas.

Sarado (france : *charade*) estas amuza ludo por diveni pensitan vorton. — La pensita vorto devas esti apartigebla ekz. en du memstarajn vortojn (ekz. « vetero » : *ve* kaj *tero* ; « ordoni » : *or* kaj *doni* ; « ventro » : *ven* kaj *tro*, k. t. p.) ; oni redaktas tri verketojn, kiuj estas la *partoj* de la ŝarado. En la unua parto oni uzas la unuan vortparton de la pensita vorto (*ve*, *or*, *ven*) almenaŭ unufoje ; en la dua parto la duan vortparton (*tero*, *doni*, *tro*) ; kaj en la lasta parto la pensitan vorton mem (*vetero*, *ordoni*, *ventro*). — Ĉe ĉi buŝa ludado oni uzas la vortpartojn *kelkfoje*, por helpi la rememoron de la divenintoj.

Kiam la uzota vortparto estas nur radikvorto (ekz. *ven*, *or*), oni povas ĝin uzi kun kia ajn gramatika finaĵo ; ĝi ankaŭ povas esti uzata kun sufiksoj kaj prefiksoj, aŭ kunmetite kun aliaj vortoj.

La unua parto de nia hodiaŭa ŝarado estas la artikoleto titolita « Diagnozo », — la dua : « Kia rapideco », — la tria : « Ĉe kuracisto », ĉiuj en la rubriko Miksaĵoj de tiu ĉi numero.

La solvejn de tiuj ĉi problemoj ni presos en nia 160-a numero, kune kun la nomoj de l'divenintoj. La solvoj devas esti sendataj poŝtkarte al S-ro *Paul de Lengyel*, 33, *rue Lacépède*, Paris. — Kvaronjare ni donos premiojn lote al la personoj divenintaj plej multe da problemoj, t. e. 1) 100 vizitkartojn kaj 100 propagandajn poŝtkartojn aŭ kovertojn ; 2) 100 prop. poŝtk. aŭ kov. ; 3) 50 prop. poŝtk. aŭ kovertojn.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33. rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto ; **Paul Fruitier**, D-ro **Servin**.
Sekretario de l'adm. : **V. Chaussegros**. Teknika direktoro : **Lengyel Pál**.

L'Imprimeur-gérant : L. WARNIER.